

TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO (TEĴA)

T r e j n a d o d e Ĵ u r n a l i s t o j

R e g u l a r o

1. Trejnado-kurso okuzas kadre de TEĴA sub egido de ties trejnado-komisiono.
2. La komisiono konsistas el tri TEĴA-estraranoj, elektitaj de membroj, kiuj respondecas pri elekto de kompetentaj docentoj.
3. Ĉiu studanto pagas al TEĴA sumon fiksitajn kaj aprobitajn de TEĴA (aktuale egalan al unu jar-kotizo de MONATO; esceptokaze kovros la kotizon TEĴA [subvenciata en 1995 de FAME-fonduso] aŭ ekz. FEL). La kotizo inkluzivas ekzempleron de Manlibro pri Ĵurnalismo [MpĴ] (Junger/Maul; Antwerpen: FEL. 1989, 2a eldono).
4. Al ĉiu studanto estas nomumita docento, kiu konsilas kaj gvidas la studenton kaj poentigas la taskaron.
5. Docento kaj studanto interŝanĝas perpoŝte la taskaron, kaj la studanto pagas la afrankon (se ne alie kaj esceptokaze decidita la komisiono).
6. La kurso konsistas el 8 lecionoj.
7. Ĉiu leciono kontribuas 25 poentojn al la finrezulto. Haveblos do entute 200 poentoj (8 lecionoj x 25 poentoj).
8. Studantoj kun 75%+ diplomiĝas kun honoro; studantoj kun malpli ol 40% ne akiras diplomon. Por akiri diplomon kandidato devas esti studinta ĉiun lecionon.
9. Interkonsente kun la trejnado-komisiono, malsukcesinto povas ripeti la kurson aŭ almenaŭ parton. La komisiono decidita, ĉu pageblos suplementa kurs-kotizo.
10. Kaze de disputo inter docento kaj studanto, la komisiono findecidas, kondiĉe ke la koncerna docento ne membras en la komisiono. Dubkaze findecidas trikapa arbitracia komisiono konsistanta el du TEĴA-membroj (maksimume nur unu membro de la trejnado-komisiono) kaj sendependa, eminenta esperantisto, kiu ne membras en TEĴA.

ppg

TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO (TEĴA)

T r e j n a d o d e Ĵ u r n a l i s t o j

Leciono 1: Enkonduko -- aŭ kiel eviti redaktoran rubujon.

La plej ŝatata redaktora ilo estas (krom ruĝa krajono) rubujo. Tien ĉio, kio redaktoron tro laborigos. Artikoloj kun evidentaj eraroj. Artikoloj mise prezentitaj. Artikoloj tedaj, longaj, subjektivaj, polemikaj. Artikoloj iel, ĉiel plibonigotaj. Alivorte: Artikoloj amatorecaj.

Bedaŭrinde, krom du-tri notindaj esceptoj, ne validas la rubujo-principo en Esperantujo. Esperantistoj estas tro komplezemaĵ, tro apogemaĵ, jes, tro naivaj, por enrubujigi la pene elŝvititajn foliojn de samideano. Pro tio legiĝas en la E-gazetaro multo, kio en profesiaj, nacilingvaj revuoj neniam presiĝus. Pro tio nepras trejnado de verkontoj Esperantaj.

Dek bazaj reguloj.

Ekzistas deko da reguloj, principoj, kiuj certigos, ke viaj artikoloj ornamas ne la internon de redaktora rubujo sed la kolumnojn de via celata revuo. Jen ili:

Komence -- verkonta.

1. Ellernu Esperanton.

Ne temas pri blago: male. KREDU nekREDU, sed abundas duonbakitaj esperantistoj kiuj, flarante la amatorecon de la plimulto de E-redaktoroj, kaj dezirante pliprofundigi siajn lingvo-sciojn per iom da verkado, arogas al si la rajton ŝtopi la leterkestojn de E-redaktoroj per siaj lingvaj provetoj. Por lernantoj de la lingvo ekzistas kursoj, lernejoj, ks. Instruistoj volonte korektas lingvo-erarojn -- redaktoroj nevolonte.

Nepre legu *Manlibro pri Ĵurnalismo* [MpĴ] p.32-42 (konstante dum la trejnado-kurso mi referencos tiun ĉi gravan konsult-libron).

2. Skribo-maŝino, komputoro kaj disko.

Nepre uzu. Krom en tre, tre, tre malmulte da esceptokazoj (se, ekzemple, verkinto en malriĉa lando ne disponas skribo-maŝinon) redaktoro rifuzos akcepti manskribitajn tekstojn. Mankas tempo, mankas emo por deĉifri hieroglifojn. Jes: Ilo monon kostas -- sed kostas al redaktoro tempon deĉifri, eventuale mem tajpi/enkomputorigi la manskribaĉon de kontribuinto . . . kiu rapide fariĝos nekontribuinto.

Se eble, rekte surdiskigu la tekston kaj tiel ĝin sendu al la redaktoro. Tamen . . . unue interkonsentu kun la redaktoro pri la kongruenco de via disko kaj de via komputora programo kaj, due, retenu surdiskan kopion por vi mem [MpĴ, p.58-59]

Populariĝas elektronika poŝto (ekz. CompuServe, E-mail, Internet). Tiel vi elektronike sendas tekston al redaktoro/presejo. Eĉ pli faciliĝas la redaktora tasko -- kaj des pli oni malemas akcepti manskribitajn tekstojn.

3. Tekst-prezentado.

Tajpu

1. nur unuflanke de la folio,
2. kun duobla interspaco de linioj,
3. kun larĝaj margenoj kaj
4. prefere en kolumnoj.

Ju pli da blanka papero, des pli kontenta la redaktoro, kiu ofte devas poluri/korekti/tranĉi artikolojn kaj tiam, per surfoliaj notoj, indiki al kompostisto la ŝanĝojn.

Denove -- nur esceptokaze akceptas redaktoro folion plene vortkovritan. Kaj se temus pri elekto inter facile legebla, facile korektebla folio kaj alia, sur kiu kunpremiĝas literoj kiel sardinoj enskatoligitaj, sendube redaktoro la unuan elektus.

Dume -- verkante

4. Koncizeco (1)

Eble la plej malfacila aspekto de porgazetara verkado. Stumblas

kaj amatoroj kaj profesiuloj -- sed memoru, ke ĉiu pres-linio devas esti iel pagata . . . ju pli da linioj, des pli da kolumnoj; ju pli da kolumnoj, des pli da paĝoj; ju pli da paĝoj, des pli altaĵ la kosto; ju pli altaĵ la kosto, des pli netolereblaj la abon-kotizoj; kaj ju pli netolereblaj la abon-kotizoj, des malpli da legantoj.

Diabla cirklo . . . kaj alia afero. Redaktoroj estas homoj, do mallaboremaj. Se sampoŝte alvenas du artikoloj, unu konciza kaj pli malpli prespreta, la alia plurfolia, evidente redaktota, klare estas, kiun preferas la redaktoro.

Zorge atentu la longecon de artikoloj en la revuo, al kiu vi intencas sendi vian tekston. Kalkulu, kiom da vortoj averaĝe enhavas la artikoloj. Tiam dividu per du . . . kaj tiel akordu vian artikolon [MpĴ, p.26].

5. Koncizeco (2)

Memoru ke, verkante artikolon por gazeto, revuo aŭ magazino, vi preparas nek eseon nek specimenon beletran. Vi komunikas. Tion vi plej efike faras, se vi vin al mallongaj, koncizaj frazoj limigas. Pruvite estas, ke homoj facile la fadenon perdas, se tro longas frazoj. Studu la propoziciojn en ĉi-regularo. Anstataŭ, ekzemple, uzi komon por longigi frazon, mi ofte finas la frazon per punkto. Kaj tiam mi komencas novan frazon. Tiel enŝoviĝas enspiro-spaco, kompreno-paŭzo . . . kiu helpas al leganto la enhavon ensorbi.

Pro tio konsilindas eviti kunmetitajn verbojn. Kontrolu, kiom da kunmetitaj verboj troviĝas en ĉi-regularo. Verboj tiaj pezigas la lingvon, kaj pezo tedas leganton kaj vualas la esencon de via artikolo.

Memoru: kial vi verkas? Por poete senŝarĝi vian koron . . . aŭ por raportiste al interesatoj ion gravan komuniki?

6. Mallongigoj, nomoj

Nek laborigu nek incitu vian leganton. Komence de artikolo, ekzemple, ne skribu UN aŭ EU. Sendube ekzistas legantoj, kiuj ne

scias, aŭ forgesis, kio estas UN kaj EU. Skribe unuamencie la kompletan nomon kun poste enkrampigita mallongigo. Ekzemple, Unuiĝintaj Nacioj [UN], Eŭropa Unio [EU]. Tiam, sekvantmencie, sufiĉas simple la mallongigo.

Simile pri nomoj. Ne supozu, ke ĉiu scias, kiel nomiĝas -- ekzemple -- la usona prezidento. Laŭ raportoj, centmiloj da unsonanoj tion ne scias. Do unuamencie skribu Bill Clinton, prezidento de Usono. Poste sufiĉas simple prezidento Clinton, aŭ eĉ Clinton.

En multaj landoj kutimas inicialo plus familia nomo: ekz. B. Jelcin. Prefere unue skribu Boris Jelcin, poste simple Jelcin.

7. Mi-ismo

Evitu evidente subjektivan starpunkton. Neniam skribu "Mi opinias, ke . . . " aŭ "Mi intencas en la sekvanta artikolo raporti al vi pri . . . ". Estas balasto! Se vi ion verkas, kaj se sube aperas via nomo, do klare, ke estas viaj la opinioj. Nur en eseo, komentario, aŭ en rubriko "Laŭ mia vidpunkto . . . " aŭ io simila, permesatas mi-ismo [MpĴ, p.22].

Ĉiam celu objektecon. Jes ja, eble vi koleras kontraŭ la politiko de la registaro, sed firmiĝas via pozicio, se vi citas la opiniojn de opozicianoj, de aliaj kontraŭuloj. Anstataŭ krude polemiki, dirante: "Mi taksas la registaron hipokrita . . . " aŭ "Miaopinie hipokritas la registaro . . . " skribu: "Laŭ opozicianoj hipokritas la registaro, ĉar . . . ".

Memoru: Kiel raportisto, vi estas nura ilo, nura atestanto. Lasu al la legantoj decidi pri justeco, moraleco. Gvidu la leganton, konsilu la leganton . . . sed ĉiam ĉiufланke prezentu la argumentojn. Estu do objektiva.

8. Ek al la afero!

En lernejoj, universitataj eseoj, oni argumentas, prezentas diversajn opiniojn, kaj finfine konkludas (ekzemple) . . . "Pro tio mi opinias, ke Hamleto ne freneziĝis, sed dum la tuta dramo plene konsciis siajn agojn."

Male en gazetara artikolo. La ĉefero, la kerno devas sin riveli en la unua frazo. Kaj la verkanto devas sian materialon tiel prezenti, ke la leganto deziras plu legi. Ĉio, kio sekvas, pravigas la unua(j)n aserto(j)n surbaze, evidente, de objektivaj, ekvilibritaj argumentoj [MpĴ, p.29-30].

Do, se temus pri Hamleto, oni skribu: "Plene konsciis siajn agojn kaj ne freneziĝis la dana princo Hamleto, laŭ studoj lastatempe aperintaj."

Tiel rekte informiĝas la leganto, eĉ se ŝ/li tute ne interesiĝas pri Ŝekspiro kaj ne plu legos.

9. La ko-do

Nepre atentu la Ĵurnalistan Ko-don (alivorte, la k-demandojn) por certigi, ke en artikolo ĉio kovriĝis. La ko-do presiĝas sur aparta folio

Poste -- verkinte

10. Kontrolu

Kontrolu . . . kaj denove kontrolu. Kontrolu ne nur la lingvon (prefere donu al kompetenta esperantisto, se eble al iu, kies nacia lingvo ne estas via) sed ankaŭ la enhavon. Ĉu la nomoj ne misliterumiĝis, ĉu la datoj enordas, ĉu la faktoj kongruas kun la vero?

Memoru: Abundas opinioj, sed oras faktoj.

ppg

TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO (TEĴA)

T r e j n a d o d e Ĵ u r n a l i s t o j

Ĵ u r n a l i s t a k o - d o

Verkante artikolon, ĉu longan, ĉu mallongan, nepre starigu al vi jenajn k-demandojn. La demandoj servu kiel kontrolilo, por ke vi kiel eble plej kontentige prilumu vian temon.

Nekredeble estas, kiom ofte mankas unu aŭ aliaj el tiuj ĉi ja bazaj facetoj de artikolo. Tiam sentas sin prifriponita la leganto, kvazaŭ oni intence kaŝus de ŝ/li eron gravan por kompletigi komprenon.

Jen la demandoj:

Kiu(j)	pri kiu(j) temas la raporto?
Kio	kio do okazis (evtl. as/os)?
Kie	kie la evento okazis?
Kiam	kiam la evento okazis?
Kial	kial la evento okazis?
Kiel	kiel la evento okazis?
Kia(j)	kia(j) la roluloj, la konsekvencoj de la evento?
Kiom	kiom da homoj/mono/ĝojo/detruo/doloro k.s. impliciĝis?
Kies	kies la kulpo/respondeco/venko k.s. ?

Evidente: Ne ĉiu k-demando samrangas, kaj la ordo de ties pritrakto dependas de la artikolo, de la evento mem.

En nekrologo elstaras respondoj al la demando Kiu; en komentario respondoj al la demando Kial; en recenzo respondoj al la demando Kia; en raporto pri katastrofo respondoj al la demandoj Kio kaj Kiel.

ppg

TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO (TEĴA)

T r e j n a d o d e Ĵ u r n a l i s t o j

Leciono 1: Enkonduko -- taskoj.

1. Legu la artikolojn *Televido kaj Ĉe la karnivalo*. Ilin laŭ la regularo kaj laŭ la k-demandoj analizu. Kiel ili kongruas, aŭ nekongruas, kun la principoj ellaboritaj en la enkonduka leciono? Verku du eseojn, unu por ĉiu artikolo, po maksimume 500 vortoj.

(15 poentoj)

2. Imagu, ke vi ĉeestis spektaklon (ekz. tian, kian oni priskribas en unu el la artikoloj). Verku gazetaran raporton pri la spektaklo, kvazaŭ vi ĝin sendus al redaktoro. Atentigu la regularon kaj la k-demandan kontrolilon, kaj limigu vin al maksimume 250 vortoj.

(10 poentoj)

(Entute 25 poentoj)

ppg

IRLANDO

Televido

Grandega problemo por la ŝtata televid-instanco en Irlando, la RTÉ, estas manko de enlande faritaj programoj, precipe en la nacia lingvo. Irlandlingvaj filmoj estas apenaŭ vendeblaj en aliaj landoj, kaj ilia relativa kosto estas altega, pro la malgranda nombro da spektantoj. Por parte solvi la malfacilaĵon rilate al vesperaj programoj, RTÉ ĉi-jare redissendis interesan serion da programoj farataj de BBC Skotlando (brita dissenda korporacio), ne en irlanda sed en la simila kaj samdevena skotgaela lingvo.

La serio titoliĝas „EORPA” (Eŭropo), kaj estas novaĵo kaj unikaĵo en la gaela. Ĝi traktas la lingvon, ne laŭ kutime kiel antikvan kuriozaĵon taŭgan por priparoli nur folkloron kaj kadukajn tradiciojn, sed kiel modernan komunikilon, per kiu oni diskutas aktualaĵojn en hodiaŭa Eŭropo. Tamen, ne nur la temaro kaj la deveno de la filmoj estas unikaj. Kvantam la prezentado estas tute en la gaela, kiam homoj el aliaj landoj parolas, oni aŭdas la originalajn lingvojn – ofte minoritatajn – de la parolantoj, akompanatajn de subtitoj en la angla, kaj kun demandoj kaj komentoj en la gaela. Do ĉiu vorto de la programo estas ĝenerale komprenebla kaj internacia, kaj ne nur gael-parolantoj povas ĝui ĝin kaj informi sin.

Tiel, malpli disvastigita etna lingvo estas efike uzata por ebligi interkompreniĝon, kaj por internaciigi la eŭropan informan reton. GMA

Ĉe la karnivalo

Arek kaj mi vizitis la 'Notting Hill' karnivalon por 2-3 horoj. Ĝi estas granda plezurtempo kaj de post nia lasta vizito (antaŭ 3-4 jaroj) ĝi pligrandiĝis.

Ne nur la landoj de Karibeano partoprenis sed ankaŭ el Afrika kaj Centra Ameriko. La unua grupo kiu ni vidis estis el la lando kun blanka verda kaj oranga flago. La kostumoj estis fantasia kaj la muziko surdigandta - mia oreloj ankoraŭ zumas!

Tiam alvenis Egipto - Kleopatra, tra iu Jamajko. Kutime la karnenoj kaj la muziko sekvas la dancistoj kaj la patronoj estis el turistoj firmoj k.t.p. Unu de la grupoj venis en kostumoj kiuj reprezentis araneoj kun aranretoj de argento, brilaj aŭ timigaj, nigraj, haraj araneoj -- kun ŝanĝoj.

La plej interesa montro (por mi) estis de 'Flamingo' - mi ne konas kiu estis 'Flamingo'. La temo estis la 'morto de la pluvarbaro'. Speciala kanto akompanis le procesion. Unue alvenis la granda, flugilato, 'La mortulo' super la kapo estis tri kranioj nigra kaj argenta. Due argenta reprezentulo de ĉentranĉilo, trie la morto de la arbo kaj la ĉirkaŭirada de la ĉentranĉilo. Poste la fajro, la timo de la bestoj kaj homoj, kaj finfine la bazo le la faligita arbo. Multaj homoj fotografis la spektaklon.

Mi scivolas ĉu aliaj esperantistoj vizitis la karnivalon, kiu estis apud la Esperanto Centro. Certe ni renkontis homoj el multe da landoj - Algerio, Pollando, Hindio, Germanio, ankaŭ la tuta longantaro ne nigra Londono, dum la tri horoj mi ne aŭdis tradicion ŝtelperkutan muzikgrupon; eble ili alvenos pli poste - aŭ eble la karnivalo iĝas tro komerca kun nur la laŭta elektronika dissendo?.

MONATO februaro, 1994

LA VP, 1994

TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO (TEĴA)

T r e j n a d o d e Ĵ u r n a l i s t o j

Leciono 2: Koncizigu vin!

Jen plendo de esperanta redaktoro:

"Plian fojon mi ripetas, sendu al la redakcio mallongajn kaj koncizajn artikolojn. Antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis debatkontribuaĵon kiu kovras pli ol tri plenajn paĝojn. Mi timas ke tiel longa artikolo malkuraĝigos legontojn" (*Sennaciulo*, februaro 1994, p.14).

Bone: Plej verŝajne ekzistas en Esperantujo revuoj pretaj akcepti tri-paĝajn artikolojn. Evidente, *Sennaciulo* ne. Do antaŭ ol sendi artikolon al redaktoro, pensu, ĉu vere laŭ longeco ĝi taŭgos. Bona redaktoro scias, ke ĉiam, senescepte, ŝ/li povas tranĉi artikolon. Malmultas, vere malmultas artikoloj, kiuj pro zorga redaktora fajlado ne pliboniĝas. Jen vorto, frazo superflua; jen koncepto jam esprimita; jen parolturno nenion aldonanta al la ĉeftemaro. Kaj ĉiam, kiam fortranĉiĝas graso, sveltiĝas, freŝiĝas, legindiĝas artikolo [MpĴ, p.20].

Ne forgesu, ke redaktoro la rajton havas mallongigi, tranĉi vian artikolon. Se vi deziras, ke redaktoro la fingraĉojn for de viaj verkistaj perloj tenu, ne gazetarocele verku artikolojn. Aŭ fondu propran revuon (sed jam abundas en Esperantujo amatoraj, ofte mizeraj revuoj!).

Jes: Redaktoroj, estante homoj, de tempo al tempo eraras. Fortranĉiĝas ĝuste la kerna parto de via argumento, de via raporto -- kaj ĉio, kio restas, laŭ vi sensenciĝis. Tamen . . . ju pli kontribuantoj laborigas redaktoron, sendante epopeojn dum sufiĉas hajko, des pli enŝoviĝas eraroj de pli kaj pli laciĝanta kaj kolera redaktoro.

Do baza principo de ĉiu raportisto devos esti koncizeco. Lernu vin bridigi, vin limigi, vin koncizigi . . . kaj tiel vi kreos artikolojn kaj legeblajn kaj legindajn.

Konata brita redaktoro opiniis, ke ĉiu evento povus resumiĝi per maksimume 30 vortoj. Troigo, sendube, sed foje estas bona ekzerco skize prezenti eĉ gravan aferon. Tiel vi lernas, ke signifon, pezon havas, kaj devas havi, ĉiu vorto. Jen specimena, 30-vorta ekzerco:

La unua mondmilito

Inter 1914 kaj 1918 (1) okazis en Eŭropo (2) inter la grandpotencoj (3) sanga (4) milito (5). Buĉiĝis (4,5,8) pro politikista obstino (3,6) milionoj (7) da junuloj (3), kaj vane (8), ĉar 20 jarojn poste (1) denove tondris la kanonoj (4,5). (29 vortoj)

Notu, ke eĉ en absurde konciza artikoleto ne leziĝas la ĵurnalista ko-do (vidu la unuan lecionon). Preskaŭ ĉiu k-demando supre trovas sian respondon:

1. Kiam?
2. Kie?
3. Kiu?
4. Kia (efiko)?
5. Kio?
6. Kial?
7. Kiom?
8. Kiel?

Notu ankaŭ, ke la artikoleto konsistigas du frazojn. Memoru, ke preferindas mallongaj, do pli facile digesteblaj, frazoj.

Sed, kvankam gazetara raporto, rimarku iomon da poezia licenco ("tondras la kanonoj" -- alude al Baghy!), kiu buntigas sekan, faktan artikolon kaj kiu anstataŭas -- eble -- "denove ekmilitis la nacioj").

Maksimo: Abundas apaĉoj kapablaj rekten, brue, laŭ aŭtovojo, je 180 km/h, ŝofori; raras kavaliroj kapablaj kviete, sen karoseri-skrapado, aŭton parkumi. Same abundas vort-apaĉoj

Kaj nun . . . turnu vin al la ekzercoj!

ppg

TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO (TEĴA)

T r e j n a d o d e Ĵ u r n a l i s t o j

Leciono 2: Taskoj!

1. Analizu la ĉi-kunajn artikoletojn. Ĉu ili sukcesas kiel koncizaj raportoj? Ĉu al ili mankas io? Ĉu iuj elstaras, plene kontentigas, modele verkiĝis?

Verku tiurilatan eseon . . . kaj limigu vin al maksimume 300 vortoj.

(12 poentoj)

2. Verku du artikoletojn, po maksimume 30 vortoj, pri grava historia aŭ aktuala evento, aŭ pri okazintaĵo el via propra vivo.

Nepre atentu la k-vortojn!

(13 poentoj)

(Entute 25 poentoj)

ppg

Militaj arkivejoj malfermiĝas
Post la disfalo de Sovetio pli kaj pli da faktoj el la historio riveliĝas. Oni eksciis, ke post la dua mondmilito en Ruslando estis mortigitaj pli ol 100 000 germanaj militkaptitoj. Usono specife interesiĝas pri dokumentoj pri la „kariba krizo” de 1961 kaj pri la korea milito de 1952-1953.

Instruistoj

Nova metodika verko

Pozitivaj eroj de la agado de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) estas la ofero de 50 lokoj en kvar instruistaj kursoj en 1993: la ĉara el tiuj okazis mezjulie en KCE (Svislando) kaj logis 12 partoprenantojn, el kiuj 4 venis, helpe de stipendioj, el Hungario, Rumanio kaj Albanio. Apogincaj estas ankaŭ la dua kaj tria gimnazioj de ILEI por junuloj 13-16-jaraj, okazintaj en Valencio kaj Koreio. Plej lasta atingo estas la apero de baza aktuala verko „Teorio kaj praktiko de lingvo-lernado” de Irena Szanser (Pollanco).

Jurnalistoj

Premio al Sarajeva rakonto

22 kongresanoj, plejparte membroj de TEJA (Tutmonda Esperantista Journalista Asocio), partoprenis la jarkunvenon, unu jaron post la asocia refondo: oni konstatis, ke la Asocio frontas gravajn financajn problemojn kaj tial oni decidis plianigi la jaran kotizon. Krome, konkretigis preparoj por trejnado de journalistoj, eventuale per koresponda kurso. TEJA kreis Premion Privat, por honorigo de individuaj journalistoj, atribuitan ĉijare al la slovena journalisto Zlatko Dizdarevic, kies libro „Rakontoj pri la Sarajeva Sieĝo” aperos baldaŭ en Esperanto-traduko.

Grupo da 14 esperantistaj journalistoj vizitis la televidon de Valencio (Kanal 9).

EKONOMIO

● De 1979 ĝis 1992 Ĉinio jam utiligis en sia konstruado ĉ. 100 miliardojn da usonaj dolaroj investitaj de alilandanoj, inkl. 34 512 miliardojn da usonaj dolaroj rekte investitaj en Ĉinio. Kun plibonigo de la investa medio, alilandaj entreprenistoj investas en pli granda skalo kaj en pli vastaj regionoj kaj sferoj. En la lastaj dekkelkaj jaroj la ĉina registaro jam sankciis starigon de 84 000 entreprenoj investitaj de alilandanoj. Ankaŭ en Ĉinio oni aplikas diversajn rimedojn kutime uzatajn internacie por enkonduki kapitalon. La laboro estas fruktodona.

Granda negoco

La germana poŝto kune kun usona Ameritech aĉetis trionon de MATÁV, Hungara Telefonacia Akcia Societo por 875 miliojn da usonaj dolaroj. La hungara telefonkompanio produktas gajnon, tamen kapitalo mankis por modernigi la telefonsistemon. La nuna negoco ebligas, ke post mallonga tempo la hungara telefonio atingos la eŭropan nivelon.

BRITIO -- EŬROPA MALPURULO

LAŬ direktivo de la Eŭropa Komunumo (EK), ĉiuj EK-membroj devos akceli reciklo-programojn por certigi, ke ĝis 60% de rubaĵoj estu reuzataj.

Tamen en Britio, kie nuntempe nur 5% de rubaĵoj reuzatas, la registaro rifuzas tiel kunlabori.

Ĝi preferas daŭrigi sian rubaĵo-entirigan politikon, kiu -- laŭ oponantoj -- polucias kaj grundon kaj akvon.

Adiaŭ Trabantoj

La urbeŝtraro de Budapeŝto lanĉis kampanjon por pura aero. Dum la unua fazo de la kampanjo posedantoj de dutaktaj aŭtoj (precipe Trabantoj) povis, kontraŭ transdono de sia aŭto por neniigo, aŭ akiri favore preze aŭtojn de malpli polua tipo, aŭ ricevi senpage plurjaran familian abonon por la urba publika transporto. Nur 709 homoj profitis la unuan eblon (anstataŭ la atenditaj 3000), probable ĉar malmultaj Trabanto-posedantoj havas monon aŭ krediton eĉ por rabatprezaj aŭtoj (700-800 mil forintoj = 360 jarabonoj de MONATO). Kompense, pli ol la atenditaj 1500 anoncis sin por trafik-abono.

Ĉu aliaj pos kunlaboras?

T r e j n a d o d e Ĵ u r n a l i s t o j

Leciono 3: Koncizigu vin (denove)!

Dediĉiĝas plia leciono al koncizeco; en ties aplikado (aŭ neaplikado) evidentiĝas tuj la profesiulo aŭ la amatoro. Laŭ la germana poeto Goethe (1749-1832): In der Beschränkung zeigt sich erst der Meister (Per koncizeco sin rivelas la majstro). Grava, ankoraŭ valida maksimumo: Bedaŭrinde nur malmultaj verkantoj ĝin atentigas.

Legu la du ĉi-kunajn raportojn. La unua, Unu Monato da Aktiveco, presiĝis en *Sennaciulo*, februaro 1994; la dua, Mia vojaĝo al Berlino, en *Svisa Fervojisto*, marto 1994.

Ke ambaŭ tiom longas (rimarku, ke tiu el *Svisa Fervojisto* temas pri daŭrigo daŭrigota!) verŝajne pravigeblas. Ambaŭ celas pli malpli fakan legantaron, kiu sendube entuziasmiĝas pri la temaro: Pri striko en Hispanio kaj pri landlimaj, trajnaj ĝenoj inter Pollando kaj la iama Germana Demokrata Respubliko. Pro tio abonantoj de la du revuoj ĉiun vorton legos, priĝuos, kaj eble relegos.

Sed ĉu vere? Ĉu vere homoj en televida epoko, en kiu jam pruvite estas, ke ordinaruloj sian informon plejparte pere de la ekrano kaj ne pere de la presita vorto akiras (vidu ekz. *Internacia Ĵurnalisto* 1/93, p.5) . . . ĉu vere tiuj homoj, ja esperantistoj, ja abonantoj de E-revuoj, ĉion tramaĉos?

Aŭ ĉu, estante bonaj esperantistoj, kiuj subtenas E-revuojn, la

abonantoj kredas, ke jam farita la devo . . . kaj tiam ŝaltas la televidon sen legi, pro manko de pacienco, fakte manko de sperto ĝenerale koncerne legadon de longaj artikoloj, la tro vortriĉan enhavon de la revuo abonita? Kiom ofte oni aŭdas -- eĉ mem diras: Ho! Mi ne havas tempon por ĉion tralegi . . . ? Kaj tiam . . . kiom da horoj semajne oni legomumas antaŭekrane?

Bone: Necesas reserĉo, por indiki kion kaj kiom oni legas . . . reserĉo malfacile realigebla. Tamen certe estas, ke raportisto, verkisto, verkonto, sian leganton devos helpi, devos superruzi, por ke tiu kuraĝu ataki artikolon. La plej trafa armilo, krom memevidente interesa, instiga enhavo, estas koncizeco.

La principon agnoskis antaŭ jardekoj reklamistoj. Ironie, ke en la pasinta jarcento, kiam almenaŭ en t.n. evoluintaj landoj analfabeteco superis nunajn nivelojn, tiamaj reklamoj konsistis ĉefe el vortoj (pensu pri por nuntempuloj bizaraj, ekzotikaj kuraciloj kaj medikamentoj).

Sed kio nun, kiam analfabeteco, kvankam ĉeesta, apenaŭ ludas rolon? Hodiaŭaj reklamoj konsistas el malmulto da vortoj; ofte tute mankas vortoj . . . ĉar superregas la bildo, la marko, la simbolo. Do ne per vortoj oni vendas . . . kaj, sekve, se en bildo-epoko oni per vortoj deziras informi, nepras ŝparemo, avareco, koncizeco.

Revene al la du artikoloj. La verkintoj bonŝancon havis. Ili supozeble sian legantaron konis; sciis, ke legantoj flamiĝos pro la temaro. Pro tio, en faka aŭ duonfaka revuo, ĝis certa grado permesatas tia longeco.

Sed ofte (ekz. en naciaj E-revuoj, kiuj celas ĝeneralan E-legantaron) presiĝas tedaj vortlavangoj (ŝatata temo estas

vojaĝo- aŭ kongres- aŭ kunven-raportoj). Tiaj raportoj gravas por la partoprenintoj, malpli por neĉeestintoj. Tamen interesa kaj valida estus konzica -- kaj leginda -- raporto pri la ĉeferoj. Imagu, ke la raporto pri la vojaĝo al Berlino aperis en via nacia E-gazeto (kaj tiaj ja aperas!). Vi ne estas spertulo pri trajn-horaroj; vi ne konas la sendube afablajn Tom kaj Irena: Ĉu do necesas scii, ke la trajno "akurate je la horo 4.55 . . . ekveturis"; ke Irena transdonis luncpaketon? Ĉu al vi, al mi tiaj detaloj gravas? Ĉu vere mi estas pli bone informita pri la eventoj, ĉu viaj, miaj scioj pri la mondo pro tio pliprofundiĝis? Kaj ĉu artikolon oni verkas . . . aŭ taglibron?

Do: Moralo. Nepre limigu vin al la esenco. Pripensu, kion inkluzivi, kion ellasi; kio tudas, kio instigas. Kaj jen la temaro de la taskoj.

ppg

esp\teja\lec.3

TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO (TEĴA)

Trejnado de Ĵurnalistoj

Leciono 3: Taskoj

1. **Zorge tralegu la du artikolojn (pri strikoj kaj pri la Berlin-vojaĝo). Imagu, ke vi verkas samteme kaj deziras**

sendi viajn artikolojn al nacia E-revuo (al revuo kun ĝenerala, ne faka legantaro). Konkizigu la artikolojn kaj verku ne pli ol po 300 vortoj.

Memoru, ke vi devas substreki ĉion gravan kaj ellasi la balaston. Notu, ke en la vojaĝ-raporto (ĉar persona priskribo) vi rajtas retenigi -- sed ne troe -- la mi-formon.

Ne uzu la mi-formon en la artikolo pri strikoj! [MpĴ, p.21-22]

(15 poentoj)

2. **Verku artikolon (maks. 200 vortoj) aŭ pri kunveno de via loka E-grupo aŭ pri iu ajn E-evento (kongreso, konferenco), kiun vi ĉeestis. Memoru, ke vi celas ĝeneralan legantaron,**

kiu interesiĝas pri ĉeferoj, ne pri personaj bagateloj!

(10 poentoj)

(Entute 25 poentoj)

ppg

Mia vojaĝo al Berlin, Pollando kaj Germana Demokrata Respubliko

de la 25-a de oktobro ĝis la 12-a de novembro 1989

Vi ĉi sube trovas daŭrigon de la vojaĝraporto de nia kolego ERNST GLAETTLI. Rememoru: Pri ĝi vi povis legi jam en "SF" 139,143, 145,147, 150 kaj 151.

La 9-an de novembro dum la vespermanĝo Tom, verŝajne ne tute hazarde, enŝaltis la televidilon, kaj vole-nevole mi fariĝis vid - atestanto de bildoj, kiuj sendube eniros la historion: La "Berlina Muro" fariĝis tralasa! Kia epokfaranta evento! Mi ne povis kredi, ke nur 6 tagojn antaŭe mi devis atendadi ĉe la pasporta kontrolo en Berlin-Friedrichstrasse 2 horojn kaj 33 minutojn. Kiel rapide la situacio povas ŝanĝi! Bedaŭrinde mi ne rajtis longe restadi antaŭ la televidilo, ĉar la mor-
da tago antaŭvidis por mi tre fruan ekvojaĝon. Sub tiuj cirkonstan-
coj Tom veturigis min tuj post la televid-novaĵoj al mia hotelo.

Vendredon, la 10-an de novembro mi devis forlasi la ĉefstacidomon Szczecin-Gł. je la horo 4.55. Ĉar ne eblis antaŭmendi taksion mi in-
tencis piediri de la hotelo al la stacidomo, sed Tom kaj Irena taksis
mian planon tro danĝera. Ili tial decidis veturigi min per aŭtomobilo,
sed mi preskaŭ ne kuraĝis akcepti tiun oferton, ĉar mi sciis, ke Tom
kaj Irena ankaŭ devos iri al la laboro kaj bezonas ripozon. Sed malg-
raŭ miaj kontraŭdiroj Tom ne forlasis sian opinion. "Je la horo 4.10
mi estos ĉe via hotelo!", li diris. Mi akceptis kaj adiaŭis mian ami-
kon per forta manpremo.

Je la horo 3.30 mia vekhorloĝo akre sonoris kaj 5 minutojn post la
kvara horo mi staris vojaĝpreta en la hotelhalo. Ne longe daŭris ĝis
kiam aŭtomobilo alveturis. Estis Tom kaj apud li sidis Irena. Nekre-
deble. Si nepre volis ankaŭ akompani min ĝis la stacidomo kaj transdo-
ni al mi lunĉpaketon. Tiel ĉarme miaj geamikoj zorgis por mi ĝis la
lasta momento. Dum la veturado Tom klarigis al mi kial ni tiel frue
veturas al la stacidomo, kvankam la trajno nur forlasos Szczecin je la
horo 4.55. Nu, la trajno venos el Gdańsk, li diris, kaj en Szczecin
multaj homoj volas eniri la trajnon, ĉar ĝi veturas al Berlin. Mi komp-
renis, kaj kiam ni alvenis sur la kajo verdire multaj personoj jam at-
tendis tie. En la sama momento la trajno enveturis la halon. Ĉar mi
posedis unuaklasan bileton Tom diris, ke ni devos iri tute antaŭen. Tion
mi faris. Tom prenis mian valizon, havante la intencon okupi por mi
sidlokon en kupeo. Mi ankoraŭ babilis kun Irena sur la kajo, kiam Tom
revenis el la vagono kun la valizo. "Ĉiuj sidlokoj estas okupataj", li
diris, "kaj en la koridoro jam staras pluraj personoj. "Ĉu mi provu en
duaklasa vagono?", demandis Tom. Mi faris rifuzan signon per mano, ĉar
mi opiniis, ke tie estas ankoraŭ malpli da loko. Sed mi decidis mem en-
iri la unuaklasan vagonon kaj serĉi adekvatan loketon en la koridoro,
por ke mi almenaŭ povu stari per ambaŭ piedoj sur la planko. Kun peza
koro mi adiaŭis miajn geamikojn Irena kaj Tom kaj petis ilin hejmen -
iri por ankoraŭ iomete dormi, ĉar konversacio nun ne plu eblis. Bone,
ke mi eniris la vagonon, ĉar, kiam la trajno ekveturis, la premo en la
koridoro estis tiel granda, ke du personoj eĉ serĉis rifuĝon en la ne-
cesejo. Mi staris ne malproksime antaŭ ĝi.

Akurate je la horo 4.55 nia trajno ekveturis. Post 10 minutoj ni atin-
is la limstacion Szczecin-Gumience. Denove estis enkalkulita 50-minu-

ta halto por la dogan- kaj pasporta kontrolo. Envenis uniformita ofi-
cisto. Li kunportis malgrandan duobla-ŝtupareton kun tri ŝtupetoj. Mi
estis scivolema, pro kio li bezonis tiun ilon. Post kiam li sukcesis
lokiĝi fin inter la multaj homoj starantaj en la koridoro, li "supren-
grimpi" ĝin, malstreĉis per ŝraubturnilo ŝraŭbojn ĉe la plafono kaj
forprenis rektangulan breton. Nun li tiris poŝlampon el la pantalona
poŝo kaj komencis ĉirkaŭen heligi la kavaĵon sub la vagontegmento. Po-
ste li refiksis la breton kaj venis malsupren. Nun la oficisto eniris
la unuan kupeon. Tri el la ses personoj, kiuj sidis tie, devis ekstari.
La oficisto nun forigis la kapapogilojn kaj per sia poŝlampo li heli-
gis la spacon malantaŭ la dorsapogiloj. Post remunto de la kapapogiloj
la pasaĝeroj rajtis sidiĝi denove. Mi pensis, ke la kontrolo nun fini-
ĝis en tiu kupeo, sed mi trompiĝis. La oficisto formetis sian kaskedon,
genuis sur la plankon kaj komencis heligi per sia lampo la spacon sub
la sidlokoj. Nur nun la pasaĝeroj en tiu kupeo rericevis ilian trank-
vilecon.

Persone mi estis scivolema kiel la afero marŝos rilate al mia pasporta
kontrolo, ĉar mi ja ne posedis vizon por en- kaj elvojaĝi la teritori-
on de Germana Demokrata Respubliko (GDR). La trajno haltis jam pli ol
unu horon, kiam envenis la vagonon alia uniformita oficisto. Li portis
antaŭ sia ventro relative grandan, verŝajne lignan, kesteton, per for-
ta leda rimeno pendigita ĉirkaŭ la kolo. Li komencis la pasportan
kontrolon je la kontraŭe situanta vagonfino. Estis por li peniga tasko,
precipe pro tio, ĉar li preskaŭ ne povis preterpasi la multnombrajn
pasaĝerojn starantajn en la koridoro.

Kiam estis mia vico mi demandis la oficiston, "Ĉu mi povas ricevi de
vi vizon por en- kaj elvojaĝi GDR-on?" "Tre volonte, tuj post kiam mi
sukcesos malfermi mian 'oficejon'", estis la afabla respondo. Por eb-
ligi tion, la oficisto petis 2-3 personojn eniri kupeon, kiu jam estis
plene okupita. Nun estis spaco por malfermi la kovrilon de la kesteto.
Pli ĝuste dirite, por malsuprenigi ĝin, tiel ke ĝi restis fiksita en
horizontala pozicio kaj povis funkcii kiel skribsubmetaĵo. Iom kompli-
ke la oficisto elprenis el sia kesteto blokon da vizoformularoj, enŝo-
vis du karbopaperojn inter la tri unuaj folioj kaj komencis plenigi
la liniojn. Kiam mi pensis, ke ĉio estas nun en ordo la oficisto miri-
gis min per la vortoj: "Mi bedaŭras, sed mi ne povas doni al vi la vi-
zon, ĉar mankas al mi la ĝusta stampilo. Mi devas komisi mian kolegon,
kiu venos post kelkaj minutoj". Mi komprenis kaj atendis.

Daŭris preskaŭ duonan horon ĝis kiam la alia oficisto venis. Sed ŝaj-
ne li posedis la ĝustan stampilon. Ĉiukaze li transdonis al mi vizon
kun stampo kaj mi pagis la postulitajn 15 germanajn markojn. Liajn vor-
tojn: "Ne plu estas agrable labori en tiel plenŝtopitaj trajnoj" mi
povis aprobi vidinte la realecon, sed mi ne komprenis, kial la vizo ne
estis akirebla ĉe la Ambassadejo de GDR en Bern, kiel estas la kutimo
ĉe ĉiuj aliaj orienteŭropaj ambasadejoj. Tiamaniere la peniga procedo
en la trajno povus forfali.

Mi jam menciis, ke la horaro antaŭvidis 50-minutan halton por la do-
gan- kaj pasporta kontrolo. Mi ankaŭ skribis pli supre, ke nia trajno
alvenis en la limstacio Szczecin-Gumience je la horo 5.05. Same ĝustas
la enskribo en mia taglibro: Gumience ekveturo: 7.41. Tio konfirmas, ke
nia trajno haltis en la limstacio inter Pollando kaj GDR 156 minutojn
aŭ, se vi volas, 2 horojn kaj 36 minutojn.

La sekvo estis, ke mi alvenis en Angermünde je la horo 8.27 anstataŭ
6.54. Per tio mi ankaŭ maltrafis en Angermünde la koneksan trajnon al
Stralsund, kiu ekveturis je la horo 7.32 kaj kompreneble ne povis tiom
longe atendi. Kion fari?

(daŭrigota)

J A G A D O J

S O C I A L

UNU MONATO DA AKTIVECO

Por la venonta 17-a de januaro estas kunvokita ĝenerala striko en Hispanio. Kia estas la situacio de la proletaro en la nuna momento? Por ĝin reliefigi mi raportas pri la novembraj mobilizadoj en Leono, unu el la plej neprogresemaĵoj provincoj de la hispana ŝtato, kie ĉiam regis kaj regas dekstraj partioj kaj la laborista movado estas tre malforta.

En la unuaj tagoj de novembro oni povis vidi kiel la striko de metalurgiistoj estis perfidita de la du oficialaj sindikatoj UGT¹ kaj CC.OO.² Malgraŭ la decido de la kunveno, kiu aprobis daŭrigon de la striko, tiuj sindikatoj subskribis kun la mastraro la proponitan plialtigon de salajroj, vera mizerajo. La afero finiĝis per manifestacieto - procesio gvidata kaj kontrolata de la sindikataj policistoj.

En la Universitato, la kurso komenciĝis ŝoke por la studentoj, ĉar ili vidis kiel la akademias impostoj estis terure plialtigataj. Oni devas memori, ke la ŝtato promesis en 1988 ne plialtigi tiajn impostojn super la IPC³. Ĉi-jare la Edukministerio subskribis pakton kun la "studentaj reprezentantoj", kiuj apartenas al asocioj kaj organizoj subvenciataj de la sama ministerio. Tiu ĉi pakto permesas al la ministerio plialtigi la impostojn kiom kaj kiam ĝi volas. Jam en oktobro komenciĝis mobilizadoj kun kunvenoj, striko kaj manifestacio. Tuj la "Studenta Konsilantaro", kiu nome de la Leona Universitato subskribis kun la Ministerio, intencis malmobilizi la studentojn per minacoj, mensogoj, kalumnioj kaj aliaj fiaĵoj. Oni organizis konstantan kunvenon por pretigi agadojn kaj kunvokis fakultatajn kunvenojn por aprobi aŭ ne kaj diskuti la proponojn. La 17an de novembro okazis striko kun 95 % -a partopreno kaj manifestacio kun pli ol okmil personoj. Tiun tagon ankaŭ partoprenis la abiturientoj kaj kelkaj studentoj enfermiĝis en unu el la fakultatoj. La 1an de decembro nova striko ne tiom subtenata. Dum la manifestacio la polico atakis, vundis pli

ol dudek junulojn kaj arestis ses personojn. Same okazis en Madrido kaj Oviedo, do oni konjektas pri kunordigita subpremado por haltigi la movadon. La batalo daŭras.

En la mino de Fabero-Sil la ministoj klopogas ne perdi siajn laborpostenojn. Tie la tuta valo vivas per la minoj, kaj ĉirkaŭ tiuj turnas la tuta ekonomio de la regiono. La posedanto de tiuj minejoj posedas ankaŭ minejojn en Ukrainio, kie estas pli malmultekosta laborforto (do estas pli facile ekspluati la laboristojn). Por li estas pli profite transporti karbon al Ukrainio kaj vendi ĝin en Leono, ol sendi ĉi tie la karbon ĉerpata en Leono mem. Jam de kelkaj semajnoj la ministoj manifestacias ĉiutage en la valo kaj blokadigas la ŝoseojn kaj relvojojn. Okazas bataloj kontraŭ la civilgvardio kaj oni malebligas la eniradon de fremda karbo en la termocentralojn al kiuj la ministoj strikantaj provizuras. Samtempe, kelkaj ministoj enfermiĝis en unu el la minejoj, aliaj dormas sur la strato antaŭ la Industria Ministerio en Madrido kaj la edzinoj de la ministoj enfermiĝis en la urbodomo de Toren⁴. La duan de decembro pli ol 7000 personoj vojaĝis al Madrido por manifestacii antaŭ la Ministerio. Tiu ĉi konflikto ankoraŭ daŭras, subtenata de la loĝantoj de la valo.

Krome, aliaj laboristoj kaj kolektivoj manifestaciis en Leono. La maldungo ŝvebas super la telefonistoj kiuj jam mobiliziĝis. Okazis protestoj kontraŭ eksplodaĵfabriko en Valderas⁵ kaj malliberejo en Mansilja⁶.

Alia fronto de tiuj sociaj bataloj komenciĝis, per rondinformado al la gazetaro, la kampanjo favore al nesubmetiĝantoj. Jam okazis du juĝoj, en tiu ĉi monato, en kiuj la prokuroroj postulis 18 monatojn da mallibero por la "kulpuloj". Dum ambaŭ juĝadoj okazis koncentrado antaŭ la juĝejo por protesti kaj diskonigi la situacion de la nesubmetiĝantoj. Por akiri monon oni okazigis feston kaj koncerton, por

subteni la kampanjon kaj ankaŭ aliajn manifestaciojn antaŭ la PSOE-ejo⁷ kaj tra la plej gravaj stratoj, por altiri la atenton pri tiu grava problemo. Jam estis fiksita nova juĝo kaj la subpremado oni sentas ĉiutage, sed la movado daŭras.

La 25an de novembro okazis manifestacio por protesti kontraŭ la ekonomia politiko de la ŝtato. Ĉirkaŭ kvinmil personoj, inter kiuj estis ministoj kaj universitatanoj, iris tra la strato en gaja kaj brua etoso danke al la krakfajraĵoj. Strikantaj ministoj kaj liberecanoj profitis la okazon por denunci la manipulantajn sindikatojn kaj iliajn manovrojn. Tiuj fiuloj volis silentigi la protestantojn sed ne sukcesis. Dum la manifestacio, provokanto montris faŝistan flagon tra fenestro, sed li estis tuj silentigita per fajfoj kaj ŝtonoj, kiel li meritis.

Fine, mi nur menciu la agadon de Duro-Felgera-ministoj, kiuj strikas pro la samaj kaŭzoj kiel la Fabero-Sil-anoj, sed en alia provinco, Asturio. Tiuj ĉi ministoj subtenas sovaĝan strikon kontraŭ la mastro, kiu estas granda banko. Unu nokton ili atakis kaj forbruligis filion de tiu banko en la sama strato kie troviĝas la Centra Policejo. Samtempe okazis tiaj agadoj en Madrido kaj la minvalo de La Felguera. Tiun strikon ili sukcesis daŭrigi danke al la forta subteno de ĉiuj felgeranoj, kies vivrimedo estas nur la mino.

Tia estas la situacio en Leono. Ĉu ni povas esperi socian vekigon?

Nikola Ĥil Karvaljo

1) UGT - Unuiĝo Ĝenerala de Laboristoj. Socialista sindikato.

2) CC.OO. - Laboristaj komisionoj. Komunisma sindikato.

Noto : Ambaŭ ricevas ŝtatajn subvenciojn.

3) IPC - Vivkosta indico

4) Toren - Ĉefurbo de la minvalo

5) Valderas - Urbeto el suda Leono

6) Mansilja - Mansilla de las Mulas - urbeto el Leono.

7) PSOE - Socialista Laborista Partio de Hispanio. Nuna estranta partio respondeca pri la ekonomia politiko kaj la subpremado kontraŭ la nesubmetiĝantoj.



TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO (TEĴA)

T r e j n a d o d e Ĵ u r n a l i s t o j

Leciono 4: Raportoj -- kaj kiel la legantaron kapti

Plej verŝajne ekzistas nenio pli grava, samtempe de verkanto-vidpunkto pli malfacila, ol raporto. Ja abundas raportoj: Raportoj pri kongresoj, raportoj pri novaj prezidantoj, pri E-kursoj kaj semajnfinoj, pri kunsidoj kaj decidoj, pri vojaĝoj kaj surstrata publico-agado.

Raporto estas la baza, kerna ne nur movada sed ankaŭ ekster-Esperantuja informilo, per kiu ges-roj Ordinaruloj (t.e. vi kaj mi) scion ĉerpas pri ĉiutagaj lokaj, naciaj kaj mondaĵ eventoj . . . ĉu pri Esperantujo, ĉu ne [MpĴ, p.20].

Pro tio gravas la raporto, kaj pro tio ĝi malfacilas, ĉar ĉefa principo de raporto estas objektiveco. Raporto diferencas de -- ekzemple -- komentario, intervjuo, recenzo kaj eseo [MpĴ, p.22-23], ĉar en tiuj ĉi permesatas subjektiveco. La verkanto, aŭ la intervjuato, esprimas siajn opiniojn: Certagrade permesatas mi-ismo, ĉar personan vidpunkton la leganto atendas, eĉ bonvenigas, se eminenta la verkanto.

Aliflanke, se evidentiĝas en almenaŭ teorie neŭtrala, objektiva raporto mi-ismo, polemikemo, antaŭjuĝoj, la leganto sentas sin trompata. Legantoj, enmaniginte raportojn, atendas ĉiuf flankan informon, plusojn, minusojn, virtojn, malvirtojn, zenitojn, nadirojn.

Objektiveco -- eĉ se la verkanto, preparante la artikolon, mordas al si la barbon (aŭ la inan metaforan ekvivalenton) pro tio, ke pro celata, profesia ekvilibro devas menciigi politiko, filozofio, sinteno tute kontraŭaj al la propraj.

Memoru: En raportoj plene superfluas viaj opinioj; en komentario, eseo k.s. probable ne (depende de la opinioj mem!).

Neŭtraleco, objektiveco: Tio ne signifas, ke raporto fariĝu teda, senkolora listo de faktoj kaj eventoj. Male. En tio konsistas la arto, la lerteco de la verkanto: Objektive raportu sen dormigi la leganton. Sed kiel?

Klare, eĉ la plej modela raporto ne estas 100%-e neŭtrala. Same, eĉ la plej modele planita lingvo (Esperanto) ne estas 100%-e senescepta. Kaj bone: Ĉar se jes, ambaŭ ĝismorte tedus; ili malvivus. Tiel ambaŭ spegulas neperfektan homan sorton.

Kaze de la raporto, la verkanto, per emfazo, per ordigo de faktoj, per la lingvo, farbas la raporton, sen tamen oferi aŭ lezi objektiveco-principon. Konsideru la jenajn ekzemplojn:

1. La ministro pri eksteraj rilatoj
dum parlamenta debato sin
defendis hieraŭ kontraŭ atakoj de
la ĉefo de la opozicia partio.
Laŭ tiu ĉi, la ministro perfidis
la nacion . . .
2. La ministro pri eksteraj rilatoj
perfidis la nacion, anoncis dum
parlamentara debato hieraŭ la ĉefo
de la opozicia partio.
Tamen la ministro sin defendis
kontraŭ la atakoj . . .

Jen objektiveco: Kaj la sindefendo de la ministro kaj la akuzo de la opozicio-ĉefo menciigas. Sed ĉu ne la verkinto de la unua raporto favoras la ministron, pro tio, ke unue okulfrapas ties (heroa, kuraĝa) sindefendo? Kaj ĉu ne la verkinto de la dua favoras la opozicion, pro tio, ke la (fia, nepatriota) perfido de la ministro unue encerbiĝas?

Tiel gravas la ordigo de la eroj en raporto; tiel verkanto kaŝe influas la opiniojn de la leganto. Tamen rimarku: Reprezentiĝas, samkiel dum jur-proceso, ambaŭ flankoj, ambaŭ argumentoj, ambaŭ starpunktoj. Finfine, en raporto, devos decidi pri vero, malvero, justeco, nejusteco ne la verkinto, sed la leganto.

Alia truko koncernas la lingvon. Relegu la suprajn ekzemplojn. Ĉu estiĝus alia etoso, se en la unua anstataŭ "sin defendis . . . kontraŭ" legiĝus "reĵetis la atakojn"; anstataŭ "atakoj" staris "kalumnioj"? Kaj en la dua: se anstataŭ "anoncis" legiĝus "akuzis"? Ĉu ne tiel fortiĝus la jam indikita antaŭjuĝoj de la koncernaj verkintoj -- sed ĉu ne ekflariĝas antaŭjuĝo-odoro? Do se objektiveco praktike restas ĥimero, ĝi tamen restu celo.

Alivorte: Ne unuflankeco, sed multflankeco. Kiel oni prezentas, farbigas, ordigas, la multflankeco restu afero de la verkanto. Kaj multflankeco inkluzivu la dek bazajn regulojn de la enkonduka leciono. Rimarku, kiel eĉ en la koncizaj alineoj de la supraĵ ekzemploj, troviĝas respondoj al demandoj Kiu (ministro, opozicio-ĉefo), Kiam (hieraŭ), Kio (akuzoj, sindefendo), Kiel/Kie (dum parlamenta debato). Tiel aŭtomate kaj neŭtrale enkadriĝas la raporto.

Tamen denove: Objektiveco ne samsignifas tedon. Kaj unu el la plej efikaj garantioj kontraŭ tedo, samtempe por kapti la atenton de la leganto, estas la enkonduka alineo [MpĴ, p.29].

Konata -- almenaŭ en Britio -- redaktoro, Harold Evans [Harald Evnz], notis, ke ĉiu frazo enhavu unu nocion. Tio signifas: Koncizaj, trafaj frazoj por koncizaj, trafaj nocioj. Kaj la plej frapa frazo estu la enkonduka; tiu, kiu anoncas la temaron de la artikolo, kiu ebligas al la leganto frandeti ties enhavon, kiu instigas al plua legado. La titolo kaptu la okulon; la unua frazo la menson.

Do la unua frazo ne troŝargiĝu de balasto, t.e. de kromaj, flankaj, koloraj, nenepraj faktoj kaj detaloj. Ili aperu en la kvara, kvina, sesa alineoj. Diru al vi: Pri kio temas la raporto? Kio en ĝi plej gravas? Ĉu mi povas ĝin resumi per unu vorto (jen eventuale parto de la titolo) kaj per unu nocio (jen sendube la unua alineo)?

Memoru, ke gazetara raporto ne similas al universitata, lerneja eseo: En tiu ĉi staras konklude la kerno -- male en raporto. Vi informas, ne edukas . . . kaj legantoj, viaj klientoj, do pagintoj, senpacienciĝas, se ili devos atendi ĝis post 2 000 vortoj por ekscii, ke prezidanto mortis, ke pro tertremo 500 homoj pereis, ke aktorino finfine decidis eksedziniĝi. Unue prezentu la ĉeferon; poste klarigi, precizigi, detaligi, analizi, konjekti. Alivorte: Unue (ĝenerale) kio-i, poste kiu-i, kial-i, kiel-i, ktp.

Turnu vin denove al la supra artikoleto pri la akuzita ministro. Ah! Jen bona titolo, simpla, trafa: Ministro Akuzita. Oni povintus tiel komenci la raporton:

Hieraŭ, en la parlamentejo, nun

restaŭrata kontraŭ miliardoj da
spesmiloj, dum debato pri
eksterlandaj aferoj, post-
tagmeze, je la 3a 15, la koncerna
ministro, laca post tutnokta
kunsido kun la usona prezidento,
estis akuzita de la ĉefo de la
opozicia partio, kiu alvenis
malfrue pro aŭto-paneo, pro
perfido kontraŭ la nacio . . .

Ne ridu! Sendube troigo, kies ekvivalento neniam legiĝus en nacia
gazeto (kvankam ĉiuj faktoj ja validas: Restaŭrata parlamentejo,
laca ministro, malfrua opozici-estro, ktp) . . . ĉar post tiom
da balasto la leganto, plene seniluziiĝinta, aŭ trovus la sport-
rubrikon aŭ -- hont! hont! -- ŝaltus la televidon.

Troigo, jes: Sed bedaŭrinde en la Esperanto-gazetaro tiaj
enkondukaj alineoj oftas. Legu la tri versiojn de Esperanta
teatro-semajnfino, ĉiuj originale verkitaĵ de la sama
partopreninto sed ĉiuj adaptitaj de la koncernaj gazetoj: *Eventoj*
(2/marto 94, p.7), *Heroldo de Esperanto* (24 marto, 1994, p.4) kaj
Esperanto (marto 1994, p.59).

Oni povus longe, kaj profite, debati la meritojn, la nemeritojn
de la tri raportoj. Menciindas, ke ĉiuj komenciĝas per mencio de
la dato (pli plaĉa la pli simpla *Heroldo*-ŝanĝo "fine de januaro":
Ĉu gravas la dato? Ĉu en la enkonduka frazo?); ke ĉiuj enkonduke
mencias la lokon (tamen *Eventoj* arogante supozas, ke ĉiu scias,
ke Barlaston troviĝas en Britio), kaj ke ĉiuj taksas grava la
partopreninto-kvoton (rimarku la pli leĝera -- kaj denove pli
plaĉa, ja natura -- "dudeko da" de *Heroldo*. Ĉu gravas, ke 17
personoj partoprenis? Ĉu diferenco, se 16? 18? [pri nombroj vidu
MpĴ, p.46]).

Tamen . . . ĉiukaze la enkonduko lamas, enuas, superfluas.
Interese estus scii, kiom da abonantoj de la koncernaj revuoj ĝis
la fino de la raportoj legis. Interesatoj pri teatro, supozeble:
Sed ges-roj Ordinartuloj? Mi dubas.

Menciindas, tamen, ke la tri revuoj ne blinde akceptis la saman
leganto-kontribuon. Ili ĉiuj adaptis, ŝanĝis, modifis -- kaj

prave, ĉar plago de la (ĉefe amatora) E-gazetaro estas, ke konstante kaj diversrevue surpaŝiĝas la samaj raportoj. Kiom ofte oni diras: Ho! Mi jam legis en magazino X! Kaj tiam oni miras, ke Esperantistoj estas abomene neabonemaj

Revene al la Barlaston-artikolo. Al mi ŝajnas, ke kernas en ĝi du aferoj -- ambaŭ plenrajtigataj kandidatoj por la valora kaj eminenta unua-alinea pozicio. Unue gravas la fakto, ke provprezentiĝis drameto de Baghy . . . kaj due, ke instigis la semajnfino al eventuala plua teatra laboro. Jen la esenco kaj de la semajnfino, kaj de la artikolo . . . multe pli signifaj ol datoj, loko kaj nombro de partoprenintoj. Do bedaŭrinde, ke la tri redaktoroj (jes ja, mi bone komprenas, ke per taskoj ili sendube superŝutiĝas) trovis nek tempon, nek emon por reverki la artikolon eble tiel:

Teatro: Ĉu nova grupo?

Trejnado de teatra trupo kaj stimulo al Esperantaj dramverkistoj -- jen la pozitivaj rezultoj de eksperimenta teatra semajnfino okazigita en Britio.

Helpis al trejnado provprezentado de Baghy-drameto *Dum tondras kanonoj*, kiun la dudeko da partoprenintoj ne nur surscenigis sed ankaŭ surbendigis.

Alia pluso dum la semajnfino, en la kolegio Barlaston, Stoke-on-Trent, estis teatra terminaro verkita de d-rinoj Marjorie Boulton kaj Kate Hall.

Kvankam mankas en Britio sufiĉe da aktoroj por regule surscenigi dramojn, esprimiĝis la espero, ke la seminario "Ni Teatrumu" instigos kaj trejnadon de aktoroj kaj verkadon de originalaj esperantaj dramoj.

Rimarkis unu el la partoprenintoj, Sploĝ Kat, 25-jaraĝa:
"Tre plaĉis al mi la semajnfino.
Ĝi multe pensigis min kaj
instigis min al plia okupiĝo pri
ĉi-neglektita flanko de Esperanta kulturo."

La semajnfino okazis fine de
januaro.

Necesas unu komento: Mi enŝovis rektan paroladon de supozata partopreninto. Ĉiam, se eble, tiel "konfirmu" vian raporton per la sendependa atesto de partopreninto. Memoru, ke legantoj interesiĝas pri homoj. Tre kontentige estas, se leganto dum legado povas krii: "Ha! 'Stas s-ro Kat en la gazeto! Lin mi renkontis ĉe kongreso en Y. Ĉu vi memoras, kara . . . ?"
Plue, de la vidpunkto de stilo, intermiksiĝo de rekta kaj nereakta, do raportita parolado, agrable tiklas leganto-menson. Tro da sameco, aliflanke, enuas.
Kaj nun: Relegu, digestu . . . kaj faru la ekzercojn!

TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO (TEĴA)

T r e j n a d o d e Ĵ u r n a l i s t o j

Leciono 4: Taskoj!

1. Elektu iun ajn raporton el la esperanta gazetaro (ekz. pri E-evento kiel la en la leciono menciita teatra semajnfino, aŭ pri socia, politika, medio-protektada temo el MONATO aŭ faka E-revuo) kaj ĝin analizu. Ĉu ĝi kongruas kun la principoj establitaĵ en la leciono? Verku mallongan kritikan eseon de ne pli ol 400 vortoj.

(5 poentoj)

2. Nun reverku la de vi elektitan raporton (samkiel ekzemple la proponitan, teorian version pri la teatra semajnfino) por ĝin akordigi kun la principoj de raporto-farado. Verku koncize ĝis maks. duono de la vortoj en la originala artikolo.

Bv. kunsendi kopion de la originala raporto cele al docenta kontrolado/komparo kun via reviziita versio!

(5 poentoj)

3. Verku kiel eble plej profesian raporton pri temo de vi libere elektita (ekz. grava aktuala politika aŭ socia temo en via lando). Verku ĝis maks. 300 vortoj kaj zorge apliku ĉiujn pritraktitajn principojn!

(7 poentoj)

4. Jam en la unua alineo de gazetara raporto troviĝas la plej grava ero. Sekvas en la dua, tria la malpli signifaj eroj. Do:

Verku raporton (maks. 150 vortojn) pri la sekvanta evento. Ordigu laŭ graveco kaj faktojn kaj komentojn, tiel kreante legindan, koncizan artikolon. Uzu mallongajn frazojn, mallongajn alineojn. Tiam aldonu trafan titolon.

Specimena raporto estos sendita kun la venonta leciono!

* Senhoma, kampara stacidomo en vilaĝo X

* Dimanĉo, post-tagmezo, ĉ. la 14a horo

* Knabino, 16-jaraĝa, brulvundiĝas pro kontakto kun elektra, katenaria kontaktodrato

* Enhospitaliĝas, luktas por sia vivo (haŭto ĝis 70% bruligita)

* Atestinto, kiu loĝas en apudfervoja dometo: "Mi aŭdis teruran knalon, vidis ekflamon kaj kuris surkajen. Kuŝis tie brulanta korpo de junulino. Mi alproksimiĝis sed tiu petis, ke mi ŝin ne helpu. Fakte, pro la kurento, mi ne kuraĝis. Feliĉe venis tuĵ poste fajrobrigadistoj."

* Vilaĝestro: "Mi gratulas la fajrobrigadon pro tuja reago al la tragedio. Samtempe mi forte kritikas la fervojon, pro tio ke estas senstabaniĝita nia stacidomo. Sendube, se tie iu deĵorus, ne estus okazinta la tragedio."

* La gepatroj de la knabino ne deziris, ke oni rivelu la nomon de ilia filino

* Policano: "Ŝajnas, ke la knabino volvis ĉirkaŭ la pojnnon kupran draton kaj ĝin ĵetis super la elektran kontaktodraton."

* Trakuras la katenario 25 kilovoltoj

* Belis la vetero, tamen dum la mateno pluvetis

* Fervoja proparolanto: "Akcidentoj tiaj tre raras. Se ĉe stacidomo oni normale kondutas, estas nenio danĝero."

* La gepatroj, kune kun aliaj familianoj, tagnokte atendas apud la hospitala lito de sia filino.

(8 poentoj)

(Entute 25 poentoj)

Nova tereno esplorata ĉe Barlastono

Fine de januaro okazis ĉe la Kolegio por plenkreskula edukado apud Stoke-on-Trent, Barlastono (GB), seminario "Ni teatrumu". Dudeko da partoprenantoj, inkluzive du eksterlandanojn, celis seriozan studon de la praktika flanko pri teatraj prezentadoj en Esperanto. Bonegan komencon portis teatra terminaro proponata



de d-rinoj Boulton kaj Hall; helpate de ĝi, la grupo rol-legis unuaktaĵon de J. Baghy "Dum tondras kanonoj": post analizo de la intrigo kaj personoj, ili formis du grupojn - unu studis scenon por radio-prezentado, alia la saman scenon preparis por teatra prezentado. Tiu lasta fakte meritis prezenton iam ie. Tamen, jen la problemo: kie troviĝas taŭgaj personoj, por kontroli kaj kontentige surscenigi teatraĵojn?

Ĉiuj lasis la finan sesion kun la esprimita espero, ke la ideo de tiu semajnfino evoluos per trejnado de la bezonata teatra personaro - eĉ por stimuli dram-verkistojn verki dramojn, verki vortojn; kiuj ofte spertos la spiron de vivanta Esperanta teatro en Britio.

Sur la foto: D-ro Derek Tatton, direktoro de la kolegio (esperantisto) diskutas kun Sally Philips.

Kulturo

Eksperimento ĉe Barlastono

Inter 28-a kaj 30-a de januaro okazis ĉe la kolegio por plenkreskula edukado apud Stoke-on-Trent seminario kun la titolo "Ni teatrumu". Ĝin partoprenis 17 personoj, celintaj serioze studi la praktikajn flankojn de la esperantlingvaj teatraj prezentadoj.



D-rinoj Boulton kaj Hall provizis teatran terminaron, kiu fariĝis tre utila dum la sekvaj sesioj. La grupo rollegis unuaktaĵon de Julio Baghy "Dum tondras kanonoj". Poste sonregistre kaj sceneje estis prezentita unu sceno. Kelkiuj ankaŭ prezentis originalan unuaktaĵon de Katarina Gilmore. Do, tiaj ekzistas, tamen en Anglio nuntempe ne troviĝas sufiĉe da homoj, spertaj por kontroli kaj surscenigi ilin.

Dum la fina sesio estis esprimita espero, ke la ideo de la semajnfino evoluos per la trejnado de la bezonata teatra personaro, por ke la vortoj ne restu senvivaj sur papero, kaj la vivanta esperanta teatro ekevolu en Anglio.

Teatro: Ĉu trejniĝos trupo?

Dum la seminario "Ni teatrumu", inter la 28-a kaj 30-a de jan. en la kolegio Barlaston (Britio), 17 personoj studis, helpate de teatra terminaro de Marjorie Boulton kaj Kathleen Hall, la unuaktaĵon *Dum tondras kanonoj* de Julio Baghy. Post rollego kaj analizo, oni preparis en du grupoj unu scenon por sonbenda prezentado, resp. surscenigo. Espe-reble, tiu semajnfino evoluos al trejnado de vera teatra trupo kaj stimulos E-aŭtorojn al dramverkado.

TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO

T r e j n a d o d e Ĵ u r n a l i s t o j

Leciono 4: Kroma ekzerco -- specimena raporto

Knabino luktas por la vivo

SENRIMEDE staris viro antaŭ la brulanta korpo de 16-jarulino, kiu provis sin mortigi dimanĉon ĉe stacidomo en vilaĝo X.

Laŭ la polico, la knabino jetis kupran draton super elektran, 25-kilovoltan kontaktokablon.

La knabino, kies nomo laŭ gepatra peto ne riveliĝis, brulvundiĝis ĝis 70% de sia haŭto. Ŝi luktas por la vivo en hospitala lito, apud kiu tagnokte atendas familianoj.

Diris la atestinto: "Mi aŭdis teruran knalon, vidis ekflamon kaj kuris surkajen. Kuŝis tie brulanta korpo de junulino. Mi alproksimiĝis sed tiu petis, ke mi ŝin ne helpu. Fakte, pro la kurento, mi ne kuraĝis."

La vilaĝestro forte kritikis la fervojon, dirante ke, se dimanĉe estus deĵoranto ĉe la stacidomo, la tragedio ne okazintus.

Sed fervoja proparolisto rebatis la kritikon: "Akcidentoj tiaj tre raras. Se ĉe stacidomo oni normale kondutas, estas nenio danĝero."

La tragedio okazis post-tagmeze ĉ. la 14a horo.

(147 vortoj)

ppg 94-04-17

TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO (TEĴA)

Trejnado de Ĵurnalistoj

Leciono 5: Intervjuoj

Plej verŝajne, dum preparado de artikolo, vi devos iun intervjui. La intervjuato posedas faktojn, informojn, opiniojn, kiujn vi deziras aperigi en via artikolo. Eble la artikolo baziĝos tute sur la komentoj de la intervjuato; plej probable, tamen, vi bezonos la vidpunktojn de pluraj intervjuatoj, por ke vi, speco de gazetara arbitracianto, finfine pesu la diversajn informojn kaj tiel kreu ekvilibritan, informoriĉan raporton.

Ĵurnalistoj ofte ne disponas sufiĉe da tempo por persone viziti intervjuatojn (klare, se temas pri kerna, multfaceta, komplika artikolo ili ja devos); pro tio simpla telefon-voko sufiĉas por havigi koncizan komenton aŭ por klarigi fakton.

Multaj profesiuloj trejniĝis kiel stenografistoj: Tre utilas stenografio dum telefona aŭ persona intervjuo. Aliaj ellaboris propran stenografian sistemon, ĉar neniam oni povas centprocente fidi magnetofonojn. Ĉiu raportisto troviĝis en embarasa situacio, kiam la baterioj elĉerpiĝis, la bendo rompiĝis, aŭ ial registriĝis nura elokventa silento . . . kaj post longa intervjuo estas ĝenerale pli facile trovi bezonatan komenton el inter skribitaj notoj ol sur bendo.

Tamen . . . intervjuinte, vi bezonas iel klaran indikon de ĉio dirita -- precipe, se vi intencas rekte citi la vortojn de via intervjuato (kaj memoru, ke rekta parolado freŝigas, vigligas raporton).

Sed zorgu: Se vi citas, citu ĝuste, precize. Se vi ion ajn encitiligos, la vortoj devas esti tiuj, kiujn al vi elbuŝiĝis la intervjuato (kompreneble vi rajtas, ofte devas, polureti gramatikon kaj elstreki ĉiujn hezito-spurojn). Sed la bazan principon ne lezu: Vortoj cititaj estas sanktaj.

Eĉ se vi enkorpiĝas nerektan paroladon, la enhavo devas kongrui kun la notoj, kiujn vi havas. Unu el la plej oftaj plendo-kaŭzoj, post aperigo de artikolo, jenas: Sed tion mi neniam diris! Silentas la plendanto, se oni povas al ŝ/li montri la neŝanĝitajn

notojn faritajn dum la intervjuo. En pluraj landoj raportisto devas konservi dum certa periodo siajn notojn por ke, okaze de (malofta) jur-proceso, la akuzito povu indiki al juĝisto, ke neniam kaj neniel falsiĝis la komentoj.

Parenteze, se temas pri honesta eraro (ekz. se raportisto atribuas la opiniojn de s-ro X al s-rino Y), tuj publikigu reĝustigon [MpĴ, p.78].

Jen do unu aspekto de intervjuo -- kiam la intervjuo ludas flankan rolon en artikolo plurfaceta. Tamen ekzistas aliaj situacioj, en kiuj la intervjuo fariĝas artikolo-kerno. Ekzemple: Oni verkas "profilo-artikolon" pri renoma, eminenta, konata aŭ iel rimarkinda persono. Tiam la intervjuato mem fariĝas la subjekto de la artikolo [MpĴ, p.21].

Dum plej versajne longa intervjuo vi devos amasigi materialon por ampleksigi vian planitan artikolon. Kion vi amasigas dependas de la intervjuato. Se, ekzemple, konata politikisto, pri kies ekonomiaj ideoj vi interesiĝas, vi esploros la ideojn: Vi ne enketos pri la aĝo, familiaj cirkonstancoj, hobiaj, kariero ktp. Se, aliflanke (kaj pli probable en Esperantaj rondoj), vi intervjuas pli malpli privatan personon (ekz. ontan prezidanton de loka E-asocio), nepras, ke vi "kolorigu" vian artikolon per facetoj de ties vivo: Kiam ŝ/li esperantistiĝis, kial, kun kiu (memoru la ko-don!). Eble vi aludos al la partnero de la intervjuato, la familio, posteno, k.s.: Tiel vi estigos kiel eble plej kompletan bildon de via subjekto.

Antaŭ la intervjuo, zorge preparu la demandojn [MpĴ, p.27]. Ofte, la nuraj demandoj kaj respondoj mem fariĝas la presita artikolo (vidu la duan ekzercon en la taskaro). Kvankam sufiĉe ofta fenomeno en esperantaj kaj kelkaj landaj revuoj (ekz. germanaj), tia intervjuo ne tre popularas en aliaj (ekz. britaj) revuoj (tamen radie, televide evidente jes!). Kutimas en presita formo miks-artikolo, t.e. artikolo konsistanta kaj el rekta parolado kaj el raportitaj personaj detaloj, opinioj, ks.

Koncerne la intervjuon mem: Ne tuj profundiĝu en la esenco de via elektita temaro. Se temas, ekzemple, pri profilo de loka esperantisto, kiu antaŭ du tagoj revenis de Universala Kongreso, ne tuj demandu: Kion vi opiniis pri la kongreso? Unue kontrolu

bazajn faktojn: ekz., kiel literumi la nomon de la intervjuato (nekredeble, kiom da eraroj tiel kaj plene nenecese estiĝas!), kiom aĝa ŝ/li estas, kie ŝ/li loĝas, laboras. Tiel vi ne nur malstreĉigos la subjekton sed ankaŭ montros, ke vi respektos faktojn, veron, precizon. La intervjuato tiel fidos vin kaj plej verŝajne poste malkaŝos al vi pli ol ŝ/li unue intencis. Nepras ligo inter vi kaj la intervjuato: Pro tio gravas la unuaj momentoj.

Kaj kvankam via verkos profilon de kongres-reveninto, memoru, ke centoj da homoj samtempe revenis de la sama kongreso. Vi devos iel apartigi vian reveninton de la aliaj. Do: Ju pli da personaj faktetoj, ju pli da anekdotoj pri la antaŭa vivo, la familia, hobia, profesia aspektoj, des pli koloro-riĉa (t.e. leginda, interesa) via skribita intervjuo.

Kompreneble, akirinte ĉiujn informojn, vi ne ekverkos la artikolon laŭ la sama skemo (unua-alinee nomo, personaj detaloj, ktp). Ekzemple, la artikolo ne komenciĝos:

S-ro A naskiĝis en jaro B en urbo C la dua filo de ges-roj A. Li havas tri fratinojn kaj ĉiuj vizitis la elementan lernejon en urbo Ĉ . . . ktp.

Same vi ne verkos enkondukon:

Hieraŭ mi havis la honoron kaj plezuron intervjui en lia ĉarma kaj agrabla salono la estimatan s-ron A kiu, kiel vi scias, revenis antaŭ du tagoj de la Universala Kongreso en la belega kaj interesa urbo E . . . ktp.

Ne! Vi memoros, tamen, ke baza verkisto-regulo koncernas la ordigon de la diversaj facetoj de artikolo, tiel ke la plej frapa, la plej atento-kapta, staras unualoke. Do el inter la materialo, kiun vi ĉerpis dum la intervjuo, vi elektos ekz. anekdoton por spicigi kaj lanĉi la skribitan intervjuon. Ekzemple:

Se ne estus falinta sur la kapon de la juna sinjoro A la Plena Ilustrita Vortaro, sendube tiu neniam estus ĉeestinta

Universalan Kongreson.

Kiam sinjoro A, nun x-jaraĝa, havis nur z-jarojn, li ludis en la studĉambro de sia patro. Subite, kaj tute neatendite, falis de sur bretaro rekte sur la kapon de la etulo unu el la plej pezaj Esperanto-volumoj.

Kompreneble la junulo ekploris: Tamen ekde tiu ĉi momento li neniam lasis el la manoj PIV-on. Pro tio, je tre frua aĝo, li fariĝis esperantisto multe pli sperta ol samideanoj jam de jardekoj parolantaj la internacian lingvon.

"Ĉu hazardo, ĉu sorto," diris s-ro A, "mi neniam scios. Certe estas nur, ke tiu incidento determinis la fluon de mia tuta vivo."

La enkonduko evidentas: Rimarku, tamen, la uzadon de rekta parolado en la 4a alineo, plus kiel kutime mallongaj, senbalastaj frazoj.

Analizu tiajn profilojn en via loka gazeto (ekz. pri homoj, kiuj iel elstaras: paro, kiu festas 50an geedziĝo-datrevenon; policisto, kiu savis ies vivon; nova lernejestro; iu, kiu post 40 jaroj ĉe la sama fabriko emeritiĝas, ks.). Analizu la enhavon: Demandu vin, kial vi plu legas, ĉu vi bone informiĝas pri la intervjuato, ĉu vi leginte iel mense, spirite profitis.

Abundas intervjuoj: gravas al gazetoj la homa, persona flanko; la iu-o prefere al la io-o. Klare: Ĉar finfine, eĉ en cinike burokrata kaj statistike meĥanika mondo, ni ĉiuj estas iu-oj.

Fina punkto: Intervjuonte, nepre kunportu kun vi fotilon. Foto-portreto vere kompletigas skribitan portreton!

TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO (TEĴA)

Trejnado de Ĵurnalistoj

Leciono 5: Taskoj!

1. Analizu la strukturon de intervjuo kun " eminentulo " (magistrato, policisto, iu, kiu festis sian 100-jaran naskiĝ-datrevenon) en via loka gazeto. Montru, el kio ĝi konsistas (anekdotoj, personaj faktoj, opinioj, ktp). Diru, kiel kaj kial ĝi sukcesas (aŭ ne sukcesas). Sendu la originalan artikolon kune kun resumo en Esperanto. Limigu vin al 300 vortoj!

(6 poentoj)

2. Legu la ĉi-kunan, laŭvortan Esperanto-intervjuon kun prezidanto de la Esperanto-Asocio de Britio (EAB) aperigitan en La Brita Esperantisto, julio-aŭgusto 1991. Notu la sinsekvon de la demandoj (unue ĝeneralaj, personaj demandoj; poste demandoj pri la nova prezidanta rolo). Via tasko: El la "krudaj" demandoj kaj respondoj, verku 250-vortan gazetaran profilon pri la nova prezidanto. Kompreneble vi komencos per atento-kapta unua alineo enhavanta ion nekutiman . . . kaj aldonu al via artikolo titolon!

(7 poentoj)

3. Kaj nun . . . via vico! Elektu el via amikaro, kolegaro, intervjuoŝton kaj verku 500-vortan profilon pri la "viktimo" -- egale, ĉu aŭ ne esperantisto. Se eble kunsendu foton!

(12 poentoj)

(Entute 25 poentoj)

INTERVJUO KUN NIA PREZIDANTO

Intervjuinto (A): *Geoffrey, vi iĝis prezidanto de EAB ĉe la Brita Kongreso, sed ĉu vi povus rakonti al mi kelkajn detalojn pri via viva antaŭ ol via Esperantistiĝo?*

Intervjuito (B): Mi naskiĝis en Otavo, Kanado kaj mia unua lingvo efektive estis la franca. Mi venis al Britio kiam mi havis ĉirkaŭ sep jarojn.

A: *Kie kaj kiam vi lernis Esperanton?*

B: En Jorkŝiro, ĉe mia lernejo (Ampleforth) de Douglas Kershaw.

A: *Post tio vi ekstudis ĉe Oksfordo, ĉu ne? Ĉu vi daŭre studis Esperanton tiam?*

B: Jes, mi iĝis membro des ODES, la loka grupo, kie mi estis publica respondeculo.

A: *Ĉu vi ne ankaŭ estis redaktoro de 'Saluton', la revuo de JEB?*

B: Laŭ mia memoro, jes. 'Saluton' ne aperis je tiu tempo do mi komencis redakti ĝin, kiun laboron mi faris dum 18 monatoj.

A: *Ne estas via unua prezidanta posteno en la Esperanto-movado, ĉu?*

B: Ne. Mi estis prezidanto de JEB dum jaro kaj duono.

A: *Ĉu vi povas klarigi al mi kio estas SEO?*

B: Temas pri Studentaro Esperantista Oksforda, tio estas la JEB grupo ĉe la universitato ĉi tie, kiu nun havas 13 membrojn. Mi helpis fondi ĝin antaŭ du jaroj.

A: *Kion vi vidis de la Esperanto-movado internacie?*

B: Nu, mi estas vojaĝinta tra Eŭropo du-foje per Pasporta-Servo, kaj ĉeestis UKojn, IJKon, IJSon...

A: *Vi ankaŭ sufiĉe multe aktivis en EAB dum la pasintaj jaroj?*

B: Jes. Mi iĝis membro de la Administra Komitato, kaj respondecas por reklamado kaj parlamenta agado.

A: *Oni konstatis de via parolado ĉe Morecambe, ke vi havas scion pri klasikaĵoj. Kion vi nun faras? Ĉu vi ankoraŭ studas?*

B: Jes, post miaj finekzamenoj la pasintan someron, mi komencis postdiploman kurson, celante diplomiĝon pri Romia historio de la 6a jarcento pK.

A: *Esti prezidanto de EAB estas granda respondeco, ĉu ne?*

B: Jes certe. Sed pro la fakto, ke mi ne plu havas ekzamenojn, mi povas dediĉi sufiĉe grandan kvanton da libera tempo.

A: *Kio pri viaj celoj por EAB dum via prezidanteco?*

B: Mi ŝatus pligrandigi la membraron kaj esperas esplori la eblecon pli kunlabori kun diversaj organizoj.

A: *Ĉu vi ŝatus preni ĉi tiun okazon diri ion al la Brita Esperantistaro?*

B: Jes. Mi dankas vin ĉiujn pro via fido en mi kaj esperas ke mi montros min inda de tiu fido.

TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO (TEĴA)

T r e j n a d o d e Ĵ u r n a l i s t o j

Leciono 6: Recenzoj

Recenzi libron estas unu el la plej plaĉaj taskoj de verkinto. Nu, bone: la frazo sonas kiel invito al plur-paĝa diskuto kadre de universitata ekzameno. Tamen tia ĝi ne estas: Male, ĝi estas sincere tenata opinio.

Unuavide verki recenzon ŝajnas preskaŭ bagatela tasko. Do . . . mi legis libron X kaj ĝi plaĉis/malplaĉis al mi. Punkto-fino. Tamen analizo de la plej elstaraj recenzoj montras sciencon, metodikon, guston . . . kaj paciencon.

Paciencon, ĉar -- kiel ĝenerale akceptite -- helpas, se la recenzonto la verkon legis. Kaj ne nur legis: Studis, esploris, komprenis. Tio tempon postulas . . . do recenzado povas esti temporaba afero.

Tamen ĉu vere temporaba? Ĉu ne la tasko de ĉiu bona esperantisto -- kaj ĉiu verkisto devas esti bona esperantisto -- ĉiam plibonigi sian stilon, sian lingvo-kapablojn pere de legado . . . kaj samtempe profundigi en Esperanto-kulturo? Tio signifas, ke legado devas esti kerna okupo de ĉiu esperantisto, kiu tiun valoran eptiteton meritas. Esperantisto, kiu sin al legado ne dediĉas, apenaŭ progresos en la lingvo.

Sed kial recenzi? Ĉu por vendigi librojn? Ĉu por plenigi la paĝojn de E-revuoj? Ĉu por atentigi legantaron pri la plej lastaj E-verkoj? Ĉu por instigi al legado? Efektive oni devas jesi al ĉiuj demandoj (tamen konata libro-peranto diris, ke aperigo de recenzo nur tre, tre malofte kondukas al pliaj vendoj).

La recenzisto estas filtrilo inter aŭtoro kaj leganto. Post filtrado restas -- espereble -- pura esenco de la libro; esenco, kiu ebligas al leganto iel orientiĝi, ĉu pozitive, ĉu negative, laŭ la tuta verko. Kaj la esenco konsistas el objektivaj faktoj plus subjektivaj komentoj.

Gvidlinioj por klasika recenzo jenas: Titolo, aŭtoro, eldonejo, dato, paĝoj, prezo, ISBN-numero, libro-kialo, enhavo-resumo,

laŭdoj, kritikoj, plusoj, minusoj, lingvo (stilo, neologismoj), la eldono mem (belaspekta, fortika), rekomendoj, recenzisto-nomo. Evidente: la sinsekvon oni povas ŝanĝi -- oni ne verkas laŭformule, sed laŭ la kriterioj de la koncernaj libro kaj laŭ la bezonoj de la legantaro, revuo. Kaj, se temas pri nova eldono de *Hamleto*, longa intrigo-resumo plene superfluus.

Studu la kvin ĉi-kunajn recenzojn (tri el *MONATO*, julio 1994, kaj du el *La Brita Esperantisto*, marto-aprilo 1993). Notu la diversajn stilojn (en *MONATO* aperas informoj pri la libro post la recenzo, en *LBE* antaŭ): Tio memorigos vin akordigi recenzon (efektive iun ajn artikolon) kun la bezonoj, la stilo de la koncerna revuo.

Notu same, ke temas pri kvar pli malpli tradiciaj recenzoj, plus unu verkita kiel speco de teatra monologo. Tie la verkinto provis kapti la spiriton de la komedio recenzata: Ĉu tamen la monologo-recenzo kiel recenzo sukcesas?

Valoros la penon tralegi recenzojn en viaj naci-lingvaj gazetoj. Ĉu ili iel diferencas disde la esperantaj?

Kaj nun, post pli kurta leciono ol kutime, turnu vin al la ekzercoj.

TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO (TEĴA)

T r e j n a d o d e Ĵ u r n a l i s t o j

Leciono 6: Taskoj!

1. Taksu la gravecon (aŭ negravecon) de recenzoj en Esperanto-kulturo. Kian rolon ili ludas? Verku 250-vortan artikolon pri la temo!

(6 poentoj)

2. Elektu kaj analizu unu el la kvin kunsenditaj recenzoj. Diru, kiel la recenzo kongruas aŭ nekongruas kun la gvidlinioj establita en la leciono. Ĉu al la recenzo mankas io? Ĉu ĝi estas iel modela? Verku 250-eseon pri la elektita recenzo! [Ne plu troveblas ĉiuj recenzoj]

(7 poentoj)

3. Via vico! Recenzu en maksimume 400 vortoj libron (prefere esperantan), kiun vi lastatempe legis. Nepre inkluzivigu objektivajn, faktajn detalojn pri la libro, kaj aldonu titolon al via recenzo!

(12 poentoj)

(En tute 25 poentoj)

La senmorta piano

Ĉi novelo havas nekutiman protagoniston – pianon! Krome, tiu piano dum du trionoj de la libro restas ne ĉeestanta, nur prirakontata, mita, preskaŭ mistera, kaj tio montriĝas tre efika maniero tajli intrigon, kiu vekas intereson. En la ne-ĉeesto de tiu piano la leganto kaptas interesajn, vivoplenajn, kortuŝajn ekbrilojn el la vivo de fruaj judaj enmigrintoj en Palestino dum la epokoj turka kaj brita. Krom tio, la leganto estas libera mem imagi ian simbolan paralelon inter la historio de la piano kaj tiu de la juda popolo.

Poste, bedaŭrinde, la mita piano aperas ankaŭ en la realo, kaj ekde tiam la rakonto tute ŝanĝiĝas kaj perdas sian kapablon sorĉi kaj ravi. Nu, ĉu ni ne ĉiuj spertis ion similan, kiam io longe sopirita realiĝas? La



rakonto tie transformiĝas de komune homa al individue stranga. Aŭ ĉu ankaŭ tie serĉi simbolan paralelon – sed kian?

La lingvo de ĉi esperanta traduko estas simpla, senriproĉa kaj bone kongruas al la enhavo. La tipografio de la broŝuro estas ege primitiva. Ĝi legindas pro la komencaj du trionoj! Sten JOHANSSON

Avner kaj Ĥana Karmi: *La senmorta piano*. Tradukis el la angla Ĥana Karmi. Eld.: Esperanto-Instituto en Israelo, Tel-Aviv, 1992. Prezo ĉe FEL: 270 BEF, ĉe UEA: 20,70 NLG + afranko.

Pri kontraŭmilita monumento

Jen libreto diversmaniere legebla. Ĝi rakontas pri la konstruado de paro de statuoj, nomata *La afliktitaj gepatroj*, farita de la germana skulptistino Käthe Kollwitz, memore al sia filo, pereinta en la unua mondmilito. Unuavide tio eble ne ŝajnas tro intere-



sa, tamen la libro iel uzas tiun temon kiel pretekston por pritrakti la evoluon de la penso de la artistino dum tiu tempo, kaj por montri la teruran efikon de milito sur familiojn.

Oni agnosku, ke troviĝas paĝoj certe kortuŝaj, kaj se la libro helpas la leganton abomeni militojn, indas pardoni al ĝi aliajn mankojn aŭ fuŝojn, pri kiuj tamen recenzanto ne rajtas silenti. Kvankam la tradukinto lerte uzis la lingvan vortprovizon, la flua legado jen kaj jen kolizias kun ripetita misuzo de pasivaj participoj: enviciĝitaj, kruciĝitaj, ŝtoniĝita, kunpremiĝitaj, naskiĝita kaj batalpereita. Tiel ofta ripetito forigas la eblecon klarigi ĝin kiel komposteraron.

La libro finiĝas per kelkaj paĝoj, sur kiuj videblas aro da nigrablankaj fotoj pri la monumento, el diversaj vidanguloj, kelkaj el ili enfokusigitaj al rimarkindaj detaloj, kiujn alimaniere oni eble pretervidus.

Daniel COTARELO García

Raf Seys: *La afliktitaj gepatroj*. Tradukis el la nederlanda Raymond Wylleman. Eld.: La Konko, Oostende, 1993. Ilustrita. Prezo ĉe FEL: 300 BEF, ĉe UEA: 18,60 NLG + afranko.

Profite vojaĝu kun Edwin

Vojaĝoj instigas ankaŭ ordinarajn homojn al pli intensa perceptado de la okazaĵoj, des pli poetojn, homojn kun viglaj, fajnaj sensoj. Edwin de Kock vojaĝis en 1985 al Eŭropo, al Mediteraneo, ja tiuj estas la regionoj de lia pradeveno kaj samtempe de lia interna kultura bazo. Li, sudafrikano, inspiriĝis ĉe siaj radikoj. Lia deka poemaro en la Internacia Lingvo dokumentas ne ĉiun paŝon, sed la por li plej gravajn staciojn. Malgraŭ la titolo *Vojaĝoj* la libro entenas ne nur la resuman kernon de lia norda itinero, sed ankaŭ tekstojn pri lia lando Sudafriko, pri Len Newell, Esperanto-poeto, kies manuskriptovolumon Edwin de Kock remalkovris dum tiu ĉi vojaĝo, kaj legeblas ankaŭ aliaj temoj, ekzemple omaĝo al la centjara jubileo de Esperanto. Ĝenerale la tekstoj ne

estas esperantismaj, sed travidebligas la – per la interna ideo pregitan – personecon de la aŭtoro.

Temas entute pri 23 poemoj, de 17-silaba hajko ĝis dekpaĝa poemego; plej ofte la verslinioj estas senrimaj kaj ne ĉiam la aŭtoro sekvas la jam sankciitajn ritmajn ordojn. Libera estas ofte la formoj, same kiel la fantazio, per kiu li vagas tra tempoj kaj spacoj. *Temposmozo*: jen unu poemtitolo trafa ankaŭ por multaj aliaj. Pro tio la tekstoj ne nepre estas facile kompreneblaj. Ne ĉiu leganto disponas pri la sama kultura fono, ne same dense scias percepti diverstempajn, plurregionajn eventojn. Sed tio tute ne estas damaĝo: La literatur-amanto ja ne legas por konfirmi proprajn limojn, sed por progresi kaj atingi novajn nivelojn. Krome la aŭtoro dankinde faciligas la aliron per klarigoj kaj komentoj historiaj, personaj, verkadaj, ktp. El la tekstoj montriĝas homo erudicia, humanisto, aŭtoro, kiu verkas ne nur por si mem, sed kiu havas mesaĝon, eĉ kie li plej persone enplektiĝas, en poemo priskribanta lian viziton ĉe la tombo de lia frato en Italio, mortfalinta tie en la dua mondmilito.

La enkonduka antaŭparolo de Jiří Karen rilatas ne nur al la tekstoj de De Kock, sed ankaŭ, ĝeneraligante, al la aliro, percepto, interpretado, taksado, ktp. de la moderna poezio. Ĝin kompletigas leginda ampleksa biografio kaj verkadteoria studo de la aŭtoro mem: „lom pri mi kaj mia verkado”.

La lingvaĵon taksu la leganto mem. Unuflanke ĝi konservas la -ujo-formojn ĉe landnomoj, same kiel la majusklojn ĉe derivaĵoj de majusklaĵoj, kaj ofte esperantigas proprajn nomojn; aliaflanke li ofte uzas ne-fundamentajn elpensojn kiel *fro*, *pon*, *cis*, *sob*, *sor*, *men*, *pre*, *far* (eĉ anstataŭ la simpla pasiva „de”). Aldonita vortlisto – enhavanta ankaŭ eble necesajn neologismojn, kiuj tute ne lezas la strukturon de la lingvo – provas pravigi tiun ĉi transiron de la zamenhofa konvencio.

Legantoj, sciantaj pretervidi la jenajn elementojn, certe ankaŭ propraprofite vojaĝos kune kun Edwin de Kock. Cetere la libro aperis en profesia, belaspekta kaj bonkvalita eldono. Franz-Georg RÖSSLER

Edwin de Kock: *Vojaĝoj kaj aliaj poemoj*. Eld.: Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen, 1992. Serio Stafeto n-ro 16. 148p. ISBN: 90-71205-45-2. Prezo ĉe FEL: 390 BEF, ĉe UEA: 21,90 NLG + afranko.

kara lingvo per partopreniga parto (*Voĉo: Partopreniga? Ni partoprenos ... tiel ... kaj tiel ... kaj tiel! Jetiĝas surscenejen brasikoj, tomatoj, ovoj, EAB-cirkuleroj kaj aliaj fatrasoj*) Oj! Momenton! Kia genia ideo! Ke vi faru la ekzercojn en viaj kluboj – grupoj – mi forte rekomendas ... (*Tamtimas tra la teatro: Kur-ten' su-pren! Kur-ten' su-pren! kaj Ko-men-cu! Ko-men-cu! La kriado de la publiko dronigas la voĉon de la aktoro, kiu malbonhumore kaj kun grimaco sin retiras. Post du-tri sekundoj leviĝas la kurteno kaj, dum hura-kriĉas la publiko, eknaĵbaras kaj boras ...*)

Metodiko de la Esperanto-Instruado: Gvidilo por instruantoj de la lingvo internacia de Rudolf Rakuša. UEA, 1991 (tria eldono). 189p.

En sia 'Metodiko' la verkinto 'skribas pri la instruisto de Esperanto, sed ne pri la neprofesia instruanto, pri la lernejoj sed ne pri societaj kursoj' (antaŭparolo), por ke tiuj, kiuj nur laŭokaze, amatore instruas Esperanton (kaj ili estas ja multaj) ĉerpu inspiron kaj scion el la profesieco de trejnitaj homoj. Laŭdinda celo, kiu en 1957, kiam aperis la unua eldono, plej verŝajne realiĝis. Bedaŭrinde, tamen, la nuna, tria eldono spegulas pasintan pedagogian epokon – tiun de la 50aj kaj 60aj jaroj (dua, ĝisdatigita eldono publikiĝis en 1970). La tria eldono estas fakte pli malpli simpla fotorepresaĵo de la dua.

Do oni legas, konforme al la moroj de la 60aj jaroj, ke 'grupa instruado [estas] moderna, sed ankoraŭ ne tute pruvita formo de instruado' (p.63), ke la lernolibro de Butler ('Step by Step in Esperanto') 'prezentas apartan specon de moderna elektanta metodo' (p.90). 'Step by Step' ne tute senvaloriĝis (kiel konsult-libro ĝi ankoraŭ elstaras); sed tiaspecaj lernolibroj jam antaŭ jardekoj dinosaŭriĝis. Furoras hodiaŭ situacikomunika metodo – per rol-ludoj, bildoj, teatraĵetoj oni paroligas studantojn: vidu la rekomendindan serion 'Tendaraj Tagoj' de Stefan MacGill.

Oni devas sin demandi, kial UEA ne ĝisdatigis tiun trian eldonon de 'klasika' esperanta manlibro pri pedagogio (kaj samtempe forigis ĝenajn preserarojn). Ĝi enhavas multon valoran, tamen pli interesos instruistojn kiel historia dokumento ol instruantojn kiel praktika enkonduko en Esperanto-pedagogion. Nepre tia libro restas ankoraŭ verkota.

Najbaroj kaj boroj de Stefan MacGill. Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1989. 215p. (Serio: Didakta kolekto de Edistudio).

Sceno: teatro, tuj antaŭ kurten-leviĝo. Elkulisiĝas aktoro, kiu jene alparolas la publikon: Gesinjoroj! Ve! Sen oraj! Kun plezuro – pun-klaŭzare – (Malaplaŭdo: aŭdiĝas ?For! For!-oj) mi prezentas al vi du teatraĵojn (Aplaŭdo) de unu el la plej inventemaj – invert-temaj – in-vent-emaj – (La publiko: Hont'! Sufiĉ!, k.s.) aŭtoroj en Esperantujo – (Voĉo el la partero: lol lol! Memoru Ŝefild-on!) nu! Esperantio, s-ro Stefan MacGill! (Aplaŭdego) Do, en Najbaroj kaj boroj, vi konatiĝos kun la Duko de Malboro (Hura-oj), kun Eternako Mencia (Siblado) kaj kun multaj, multaj aliaj; kaj eĉ pli! Ni antaŭokuligos al vi (Efektopaŭzo) zum-enhavan Zamenhofan statuon! (Esprimiĝas miro, spicata de Skandal'! Fi! k.s.) Jes! Statuo laŭstatuta! Plus – PIV-otas vortludoj inunde abundaj (Elgalerie: Gardu nin!) Jes! Rigardu vin en teatraĵa spegulo! Kaj ne tiel amare el la gal-erio, mi petas vin! Ilo, jes, kara spektantaro, ne forgesu la antaŭparolon de sinjoro MacGill pri trotea rolo – mi bedaŭras, pri teatro-rolo – en Esperanto! (Elgalerie [denovel: Ne 'avas la libron!]) Do, ĝin aĉetu – ne nur pro la teatraĵoj, ne nur pro la vortludoj (Malaplaŭdo: elgaleriĝas Aĉ! Aĉ!), ne nur pro la antaŭparolo (La publiko ekmalpacientiĝas: Kulisen! Senlaborulejen! Faŭkon! k.s.), sed ankaŭ pro stelare elstaraj lingvo-ekzercoj bazitaj sur la teatraĵoj, por ke (Voĉo el la unua balkono: Porke!) vi, ektimantaj pekantoj – aĥ! estimataj spektantoj – pliprofundigu viajn sciojn pri nia kalva ingo – ha! kio nun? Je Sankta Festano ... Sankta Stefano ... macgilfektiĝis mi – pliprofundigu viajn sciojn pri nia

Leciono 7: Redaktado

Kiel jam dirite, abundas en Esperantujo revuoj, gazetoj, informfolioj, ks. Ĉiu -- almenaŭ teorie -- havas redaktoron (tamen, legante la plej mizerajn specimenojn, oni sin demandas, ĉu la moŝta t.n. redaktoro vere komprenas sian taskon).

Tamen, pro tio, ke verkemaj esperantistoj ofte respondecas pri bultenoj, informiloj, ktp, inkluziviĝas en la kurso leciono pri redaktado [MpĴ, p.65-76].

Sendube la plej grava peko farita de amatoraj redaktoroj konsistas en tio, ke ili ne redaktas. Tio sonas ja idiota, sed estas vera. Alivorte: Amatoroj akceptas ĉion ajn sen pensado pri longeco, taŭgeco, legindeco, legebleco. Dankaj ili estas, ke iu ion sendis . . . kaj hop! Surpaĝigita! Rezulto: Ĥaosa, oscediga, foje erara kaĉo.

Klasikan, bone verkitan artikolon oni povas redakti (t.e. tondeti) de malsupre supren. Vi memoras (leciono 4), ke la plej gravaj faktoj, vidpunktoj staras en la unua alineo; la malplej gravaj, la balastaj, en la finaj alineoj. Tio signifas ke, se redaktoro trovas, ke al ŝ/li mankas spaco, la artikolo ne tro suferos, se perdiĝos la lastaj alineoj. Tia redakto-maniero ŝparas tempon kaj kutimas en profesiaj rondoj.

Esperanto-artikoloj, bedaŭrinde, pro manko de trejnado de verkintoj, ne tiel konstruiĝas. Sin trovas polvo unua-alinee, perloj fin-alinee. Tio signifas, ke esperanta redaktoro, celante koncizan, poluritan artikolon, devas ĉie tondeti kaj ĉizi, ĝis estiĝas la dezirata rezulto. Multe pli malfacile estas redakti amatoran, esperantan artikolon ol profesie verkitan.

Bona redaktoro konstante dancas sur ŝnuro streĉita inter propra inklino kaj tiu de la verkinto. La redaktoro devas respekti la aŭtoran volon; samtempe devas kompreni la menson de la legantaro. Tondetante, ŝanĝetante, la redaktoro devas esti certa, ke ŝ/li ne lezas la originalan intencon de la verkinto; devas tamen

certigi, ke tio, kio finfine aperos, alparolas la legantaron. Por pli bone kompreni redaktoran sintenon, studu la ĉi-kunajn ekzemplojn de redaktotaj kaj redaktitaj artikoloj. Aŭtoro-nomoj strekiĝis. Legu unue la tekston *Paris - London*, tiel ke ĝi riceviĝis de la redaktoro.

Okulfrapis unue, ke la originalo enhavis tiom da teknikaj, fervojaj terminoj por eksciti ĝeneralan legantaron. Do la sekcio *Determinado de varmiĝintaj trajnaksoj* tranĉiĝis kaj en la presita formo sekvas la de ĝenerala vidpunkto pli interesan informon pri la submara tunelo. Rimarku, ke malaperis detaloj: Ashford, 30km antaŭ la tunelo. Ĉu tiaj punktetoj vere necesas, iel kontribuante al nia scio? Rimarku same, ke la peza frazo: ". . . instalaĵoj, kiuj ĉiujn trajnojn sekuras aldone al la normalaj sekurinstalaĵoj" plene aliformiĝis.

Tralegu la duan artikolon: *Navettrajnoj tra la submara tunelo*. Krom lingva polurado (*navedo*, anst. *erare naveto*), rimarku, kiel redaktado sveltigis, kaj samtempe legindigis la artikolon. For la balastaj komentoj pri "kontraŭ veterinfluoj ŝirmita vojo tra la tunelo" (klare, ĉar ne ekzistas tunelo malferma al ŝtormo kaj suno . . . ĉu?) Same troaj la rimarkoj pri terminaloj kun restoracioj, telefonoj, vendejoj, informejoj. Ĉu vi iam vidis, eĉ povas imagi, trajn/bus/aviadil-terminalon sen tiaj trukoj? Kaj gardu vin kontraŭ reklamado, kiu finfine naŭzas legantaron: La aŭto-trajnoj konsistos el "komfortaj, hele lumigitaj vagonoj." Diable! Kion oni atendas? Barelojn plus du-tri kandelojn?

Povas esti, ke faka legantaro entuziasmiĝas pri ĉiuj detaloj, sed nepras, ke vi -- ĉu verkanto, ĉu redaktoro -- zorge atentu la legantaron. Tio signifas ke, se vi pli malpli samon deziras diri al diversaj legantaroj, en diversaj revuoj, vi devos fajli kaj cizeli, ĝis produktiĝas artikolo akordiĝonta kun la interesoj, la scioj, la fonoj de la legantoj.

Tiurilate kaŭzas apartajn problemojn gazetaraj komunikoj, t.e. raportoj destinitaj samtempe al pluraj revuoj. Nenio pli enuigas leganton, ol remaĉado de la sama temo. Kial aboni ekz. al *Esperanto*, *Heroldo*, *Monato* kaj *Eventoj*, plus al nacia E-revuo, se en ĉiu oni legas la saman artikolon? Do kiam *Monato* (parenteze nemovada magazino) ricevis komunikon de la itala Radikala Partio

(vidu la folion), ĝi taksis la informon sufiĉe grava por ĝin aperigi, sed nepre ne laŭvorte . . . kaj nepre ne kun tiom da balasto. Do publikiĝis en *Monato* kerna, esenca anonco: Bona, kompromisa solvo al dilemo pri ĉion aperigi kaj legantojn enuigi aŭ pri la tuton enrubujigi.

Alispeca problemo koncernas manskribitajn artikolojn. En profesiaj rondoj oni ne akceptus manskribitajn foliojn: Simple mankas tempo por ilin pritrakti. Tamen esperantistoj agas pli ĝentile: Vidu la ĉi-kunan rezulton. Sed ne kredu, ke principe akceptiĝas manskribitaj tekstoj. Se amatora, vespere laboranta, do laca redaktoro de E-revuo devos elekti inter tajpitaj aŭ manskribitaj folioj . . . do divenu, kion ŝ/li elektos.

Sed la plej teruraj, la plej timigaj artikoloj, tiuj, kiuj pensigas redaktorojn pri tuja aksiĝo, koncernas la tro longajn, ofte ne tuj kompreneblajn raportojn, en kiuj tamen kuŝas io dirinda, verkitajn de amatoraj, sed entuziasmaj aŭtoroj. Denove: Tia artikolo, kiu tro laborigas redaktoran skipon, en profesiaj rondoj tuj enrubujeniĝus. Sed esperantistoj, bonkoruloj, tro helpemas . . . do ĝemspirante, viskion glutante, la kompatinda redaktoro esperantista enmanigas krajonon kaj, pezkore, ekkonstruas sur la artikolo-ruinoj templon al Ĵurnalismo.

Legu ekzemple la unuan, tre longan, alineon de la artikolo *Parlamentaj balotoj kaj ekonomia resaniĝo*. Kio estas UN? Sendube la verkinto, kune kun la redaktoro, scias: Tutcerte estas iu leganto, ie, kiu ne scias, kaj pro tio nepras klarigo. Mankas jam en la dua frazo nominativoj; kio damne estas "din" (ja dinaro, sed tion leganto ne scias, ĝis posta mencio)?; kaj enŝoviĝis tro persona "mi aŭdis." Plue: Kiel rilatas la unua alineo kun la titolo?

Kaj se ekoscedas redaktoro (speco de arbitracianto inter verkinto kaj leganto), plej verŝajne ekoscedas abonantoj. Kaj oscedantaj abonantoj baldaŭ fariĝas abonintoj. Do . . . kiel poluri, kiel legindigi la raporton? Nu: Vi povos sekvi la diversajn paŝojn pere de la kune metitaj folioj.

Unue: redaktita teksto, kun amaso da forstrekitaj frazoj, sagetoj, aldonetoj . . . kaj plene nekomprenebla al kompostisto. Do sekvas dua paŝo: Enkomputorigi ĉion por elektronike sendi al

la presejo. Evidente iu iam devos entajpi la tekston, kaj pro la multaj ŝanĝoj estus troa ŝarĝo por kompostisto ĉe la eldonejo. Do redaktoro kun aliro al komputoro kongrua kun tiu de la presejo povas helpi la kompostiston, kiu evidente devas respondeci pri la fina aspekto, do la surpaperigo de la redaktita artikolo. La fina, presita versio kompletigas la ciklon . . . sed rimarku eĉ je tiu ĉi fazo ankoraŭ kelkajn ŝanĝetojn (ĉefe koncerne stilon) faritajn de la eldoneja ĉefredaktoro aŭ de revizianta skipo. Do redakti signifas ne blinde akcepti artikolon. Ĝi signifas certigi, ke artikolo kompreneblas, alireblas, eĉ aprezeblas al leganto. En ĉiu verkanto devas sidi almenaŭ redaktoreto . . . kaj ju pli oni komprenas pri la redaktora arto, des pli profesiaj estos la propraj artikoloj.

Paris - London Determinado de varmiĝintaj trajnaksoj

Inter Londono kaj la nova submara tunelo al Francio, proksime de la urbo Ashford(Eŝford) estas kreitaj instalaĵoj, kiuj ĉiujn trajnojn sekuras aldone al la normalaj sekurinstalaĵoj. Ilia speciala tasko estas, ekkoni varmiĝintajn akslagrojn kaj ĉiujn tro forte varmiĝintajn bremsojn kaj tuj anonci tion al kompetenta komandejo. Tiu loko situas ĉirkaŭ 30 km antaŭ la tunelo. Helpe de tiuj specialaj instalaĵoj ĉiu trajno, pri kiu estas anoncita danĝero, estas aŭtomate haltigata, antaŭ ol ĝi atingas la enirejon de la tunelo.

La teknika efikmaniero estas tre komplika, ĉar sur tiu linio trafikos plej diversaj vagonspecoj, kies akslagroj troviĝas en diversaj altecoj super la relo kaj en diversaj distancoj de la trakmezo.

Similaj instalaĵoj jam ekzistas ĉe fervojoj en Aŭstrio, Francio, Germanio, Hispanio kaj Nederlando.

Navettrajnoj tra la submara tunelo

Kiu estonte per aŭtomobilo intencos veturi al Anglio, povos elekti inter la ĝis nun kutima maniero per pramo aŭ la nova, kontraŭ veterinfluoj ŝirmita vojo tra la submara tunelo. Tio okazos helpe de t.n. navettrajnoj, kiuj trafikos sub la nomo "Le Shuttle".

La traveturado daŭros nur 35 minutojn. La trajnoj trafikos ĉiujn 20 minutojn, se necese eĉ ĉiujn 15 minutojn, nokte minimume unu fojon po horo. Tiuj aŭto-trajnoj konsistos el komfortaj, hele lumigitaj vagonoj. Ili neniam ŝanĝos la direkton, sed daŭre veturos "antaŭen", kvazaŭ en cirklo. Ili ekzemple veturos post kargado en la franca terminalo en la tunelon kaj aliflanke en la angla terminalo tra granda trakringo al la malkargad-instalaĵo. Tuj la alvenintaj aŭtoj povos antaŭen forlasi la trajnon, dum samtempe la atendantaj aŭtoj enveturas la trajnon tra ties fino. Kaj tuj komenciĝos la posta transporto.

Unu duono de la trajnoj havos lokojn en du etaĝoj por person-aŭtomobiloj, la alia duono estos destinita por aŭtobusoj, loĝaŭtoj kaj similaj. En ambaŭ terminaloj ekzistos restoracioj, vendejoj, telefonoj, informejoj kaj necesejoj. La dogankontrolo nur okazos antaŭ kargado, tiel ke post forlaso de la trajno la aŭtoj tuj povos starti al aŭtoŝoseo.

Navede sub la maro...

Kiu estonte per aŭtomobilo inter Francio kaj Britio veturos, povos elekti inter pramo kaj submara tunelo. Tio okazos helpe de t.n. navedotrajnoj (frangle: *Le Shuttle*). La traveturo daŭros 35 minutojn.

La „navedoj” trafikos ĉiun 20an minuton, laŭnecese eĉ ĉiun 15an minuton, kaj nokte veturos minimume unu trajno hore. La trajnoj neniam ŝanĝos direkton, sed daŭre veturos „antaŭen” pro trakringoj ĉe franca kaj brita kargado-instalaĵoj. Transportitaj aŭtoj de antaŭe forlasos la „navedojn”, dum samtempe ekveturontaj aŭtoj eniros de malantaŭe la vagonojn, kaj duetaĝajn (por personaj aŭtoj) kaj unuetaĝajn (por ŝarĝaŭtoj, ruldomoj, aŭtobusoj). La dogankontrolo okazos antaŭ kargado. La tunelo, nun finkonstruita, antaŭvideble malfermiĝos en majo 1994.

...sen varmiĝintaj aksoj

Inter Londono, Britio, kaj la submara tunelo al Francio instaligis apudrelaj aparatoj por ekkoni varmiĝintajn akslagrojn kaj bremsojn. Kiam registrigis problemoj, aŭtomate haltas la

trajno antaŭ ol eniri la tunelon. La teknika efikmaniero estas tre komplika, ĉar laŭ tiu linio trafikos plej diversaj vagonpecoj, kies akslagroj troviĝas diversalte de la relo kaj diversdistance de la trakmezo. Similaj instalaĵoj jam ekzistas ĉe fervojoj en Aŭstrio, Francio, Germanio, Hispanio kaj Nederlando.

USONO

Lingvo-problemoj? Ne ĉe ni!

En tiu mondkaldrano kiu estas Usono, parolataj estas preskaŭ ĉiuj lingvoj de la mondo. Kaj, kvankam ekzistas neniuj leĝoj postulanta la uzon de la angla, tiu ĉi estas pli-malpli la „oficiala” lingvo de la lando. Tamen ne ĉiuj loĝantoj de Usono parolas ĝin. Laŭ plej freŝaj statistikaj informoj, timige granda elcento de la

HELPOKOKO EL SARAJEVO

Kiel helpi al esperantistoj en Sarajevo, kiuj frostas kaj malsatas. Ili sopiras al pakaĵoj, en kiuj troviĝus manĝaĵo kiel lakto- kaj ovo-pulvoro... Tamen, ne ekzistas fidinda maniero sendi ion ajn al Sarajevo, eĉ skatolo da medikamentoj ne. Esperantistoj mesaĝis, ke la plej fidinda organizaĵo kiu portas helpon al Sarajevo montriĝis ĝis nun ADRA – Organizo por helpo ĉe adventistaj preĝejoj.

Ĉu la pakaĵoj financataj per la Fondaĵo Espero el Roterdamo al la adreso de trideko da esperantistoj atingos sian celon en Sarajevo? Longe ni devos atendi respondon.

usonaj loĝantoj malmulte, aŭ tute ne, parolas la anglan. Por helpi al tiuj ĉi, diversaj servoj estas proponataj en aliaj lingvoj ol la angla.

Tertremoj

Inter ili, la plej freŝaj estas la servoj de la kalifornia krizo-buroo, kies informoj pri kiel prepariĝi kontraŭ tertremoj haveblas en naŭ lingvoj (angla, hispana, ĉina, tagaloga, hmonga, vjet-nama, kamboĝa, korea kaj japana). Tamen surbendigitaj informoj estas haveblaj tuj nur en la angla. Por aliaj lingvoj oni diktas al la respondilo nomon, adreson, telefon-



Ankoraŭ multo farenda antaŭ majo...

GAZETARA KOMUNIKO

RENKONTIGHO INTER LA EUROPA KOMISIONANO RUBERTI KAJ DELEGITARO DE LA RADIKALA PARTIO PRI LA TEMO ESPERANTO KAJ EUROPA UNIO

Bruselo, 7an de januaro 1994. Prof-ro Antonio RUBERTI, Komisionano de EK, hodiaŭ matene akceptis delegitaron de la Radikala Partio konsistantan el Olivier DUPUIS, prezidanto de la Ĝenerala Konsilio de la RP, Giorgio PAGANO, responsulo pri la kampanjo de la RP por la rajto je la internacia lingvo kaj Giovanni MARTINETTO, kunlaboranto de EEU; la delegitaro ghisdate informis lin pri la stato de la kampanjo kaj prezentis al li serion da proponoj koncernantaj la demandon pri la lingva komunikado en la konstruado de Eŭropo.

Koncerne al la novaj programoj de instruado kaj trejnado pretigitaj de lia Oficejo, Prof-ro Ruberti deklaris sin preta subteni efektivigon de profundigaj esploroj, pilot-projektoj kaj eksperimentadoj.

Koncerne al la demando pri subsidiareco teme pri edukado, la propono de la delegitaro de RP, transiri la nunan situacion donante efektivajn povojn al la Unio en la sektoro de lingva edukado, la Komisionano opinias, ke en la nuna momento de emo al refaldigo sur naciaj pozicioj ghi estas malmulte realigebla.

Dankinte lin, la radikala delegitaro antaŭanoncis al li la prezenton de amendoj en la diversaj kompetentaj sidejoj (Konsilio, Eŭropa Parlamento kaj Komitato de la Regionoj) pri la programoj ellaboritaj de la Eŭropa Komisiono.

Radikala Partio
che Eŭropa Parlamento
Rem. 508
Rue Belliard 97-113
1047 Bruxelles
Tel. 284 2579
Fakso 230 3670

Militistoj infektitaj

Dum kontroloj post reveno de la belgaj militistoj el Somalio, kie ili partoprenis en la granda kampanjo *Restore hope* (Restarigu esperon), evidentiĝis ke deko da ili infektiĝis je la aidoso-viruso. La infektadon ili verŝajne ricevis dum mallonga ferio-periodo en la kenja ĉefurbo. La milita



Ĉu belgaj militistoj aidos-infektiĝis dum sia misio en Somalio?

estraro tamen atentigis siajn subulojn pri la sano-danĝero kaj en la norma ekipaĵo de la soldatoj troviĝis kondomoj por eviti la riskojn. Armeaj aŭtoritatoj neis la informojn, dirante ke ili nek ekzamenigis la soldatojn, nek havas tiajn rezultojn pri soldatoj kiuj libervole kontroliĝis. gvd

Radikala renkontiĝo

Membroj de la Radikala Partio (RP), inkl. de la prezidanto de ties ĝenerala konsilio, Olivier Dupuis, komence de januaro renkontis komisiiton de la Eŭropa Unio (EU), Antonio Ruberti, por prezenti serion da proponoj pri komunikado en Eŭropo. Laŭ informo de RP, Ruberti deklaris sin preta subteni diversajn esplor-projektojn sed taksis la proponojn pri lingvo-edukado aktuale nerealigeblaj.

Sola aŭ kune?

Ekde la unua de januaro 1994 Aŭstrio estas membro de la Eŭropa Ekonomia Areo (landaro ekonomie ligita al la Eŭropa Unio). Fakte oni ne rimarkis ian drastan ŝanĝon. Restis doganaj bariloj, ne rimarkeble falis prezoj (tion la politikistoj promesis), ne venis nova monsisistemo.

Daŭras nur la diskuto ĉu Aŭstrio iĝu ankaŭ membro de la Eŭropa Unio (EU). Tri aferoj ankoraŭ ne estas fintraktitaj. La kamiona transito inter Germanio kaj Italio kaŭzas gravan median damaĝon en Aŭstrio. Tial

estas planata nova fervojlinio inter ambaŭ ŝtatoj. La nombro de kamparanoj kaj ties enspezoj, ĉefe en montaj regionoj, ekde jardekoj ege malkreskas. Oni timas ke ilia situacio kadre de EU iĝos pli malfavora. Multaj domoj kaj loĝejoj en belaj turismaj regionoj jam nun estas posedataj de neaŭstroj. Post aliĝo al EU ĉiu EU-civitano havos la rajton aĉeti ĉiujn vendeblan domon, loĝejon aŭ terenon.

Laŭ la aŭstria konstitucio membriĝo al EU eblas nur post plebiscito. Tiun oni planis por mezo de 1994, sed ĝi okazos plej frue en 1995. Laŭ enketoj ankoraŭ ne estas klara plimulto.

Walter KLAG

Difterio antaŭenmarŝas

La situacio pri disvastigo de difterio en Ruslando hodiaŭ estas ne nur streĉa, sed vere kriza: la ofteco de malsaniĝo akre kreskis en 17 regionoj de la lando. Dum 9 monatoj de 1993 oni enhospitaligis preskaŭ 10 milojn da difteriuloj, inter kiuj unu kvarono infanoj. Por ĉiu 25a paciento la malsano estis mortiga. „La epidemio povas ekflami ankaŭ en aliaj regionoj” pesimisme prognozas ĉefa eksperto de la ministrejo pri sanprotektado de la Rusia Federacio Miĥail Narkeviĉ.

Oni distingas du ĉefajn kaŭzojn: 1. Dum longa periodo (i.a. pro influo de amaskomunikiloj, kiuj troigis negativajn efikojn de vakcinado) gepatroj evitis vakcinadon de sia idaro kaj en la lando nun vivas jam kelkaj gene-

racioj de neprotektitoj; 2. Fakuloj opinias, ke en la mondo aperis nova, pli agresa speco de bakterio de difterio. NikSt

Krimoj en rusia armeo duobliĝis

Laŭ informo de informagentejo „Krim-Press”, dum 9 monatoj de 1993 en ruslanda armeo pro krimoj estis akuzitaj 9 mil homoj. Ankoraŭ 4 mil – en organoj kaj trupoj de ministrejoj pri internaj aferoj kaj pri sekureco. Fakestro de militaj tribunaloj asertis, ke kompare kun la respektiva periodo de 1992, kvanto de militaj krimoj duobliĝis. Eĉ pli – 2,5-oble – plioftiĝis kazoj de dizerto. Ankaŭ kreskis ofteco de murdoj, ŝtelado, forŝteloj de aŭtomobiloj, ktp. Dum lasta duonjaro en la armeo pereis ĉ. 300 homoj. nst

Komputilo kontraŭkrima

La nombro de kaptitaj krimuloj en Tyneside [Tajnsajd], Britio, je la ĝojo de la loka polico, draste altiĝas – pro nova komputilo. Krimo-detaloj ĉiuj enkomputiliĝas, tiel ke la polico povas kun sukceso prognozi, kiam kaj kie plej verŝajne okazos krimo. La komputilo rekonas krimulo-kutimojn kaj scias, ekzemple, ke je certa horo estas ŝtelitaj aŭtoj en tiu aŭ tiu parkejo. Do, kiam sin prezentas krimulo, same sin prezentas policisto, kiu kaptas je freŝa faro la superruziton.

PPG



Al la landoj kie MONATO estas legata, aldoniĝis Kamboĝo. Jen legantino Suy Serey (dekstre), kiu salutas vin.

Foto Heide KUHR

Neĝoblankulino kaj dudek gnomoj.

Divis-estis la knabino Nataŝa. Ŝi estis malgranda kaj blanketa, unuvorte, aŭtentika neĝoblankulino.

Ŝi fidis al mirakloj kaj al fabeloj. Sed tempo iris. La mirakloj ne okazis. Nataŝa elkreskis kaj iĝis plenaĝulino. Sed ŝi daŭrigis fidi al la mirakloj kaj al la fabeloj. Ŝi komencis kolekti gnomojn, ĉar ili estas el la fabelo.

Ni scias, ke gnomoj estas mitaj barbhava, malgrandeguloj, gardantaj subterajn trezorojn. Ili estas bonaj forĝistoj kaj entute metiistoj. Laŭmitoj de unuj popoloj ili estas malbonaj laŭ legendoj de la duaj bonaj.

Kaj ankoraŭ oni diras, ke gnomoj ŝata forrabi virinojn. Kompreneble belajn. Do ankoraŭ erotiko por ili ne estas fremda.

Sed tiaj dudek rondvizaĝaj barbuloj, kiujn vi vidas sur la fotoj, loĝas ne en subterejo, sed en ordinara urba loĝejo de neĝkovrita, dromanta en la senmateriga polusa nokto Murmansk. Ilia mastro Nataŝa tre ĝojas kiam sukcesas kompetigi sian gnomon frataron. Nataŝa kredas, ke gnomoj alportos al ŝi feliĉon. Ŝi havas 33 jarojn, ŝatas muzikon, ludas pianon. Nataŝa estos tre ĝoja se ŝi trovos samideanojn kaj ricevos novajn gnomojn. Ŝi revas pri granda kolekto de gnomoj. Por tio ŝi komencis lerni Esperanton. Ŝi jam havas 8-lernolibron. Ĉble la reekoj de esperantistoj instigas ŝin pli rapide iĝi vera esperantistino.

PARLAMENTAJ BALOTOJ KAJ EKONOMIA RESANIĜO

Neprevigebla blokado de tiu ĉi lando fare de UN ĉiam pli kaj pli multe premas loĝantaron de Serbio kaj Montenegro. Jam sentas sin malsaton, diversajn malsanojn, senlaborecon kaj negativajn konsekvencojn. Pro ĉio infanojn, virinojn kaj maljunulojn multe suferas. Longaj vicoj de loĝantaĵo, antaŭ tre ofte, preskaŭ malplenaj vendejoj, estas ĉiutagaj bildoj en ĉiuj urboj. La ekzistanta inflacio superis ĝis nun notitaj en la mondo. La germana mono, marko, estas dominanta kaj plej serĉata valuto kaj per kiu estas ĉion trovebla kaj aĉetebla. Tiel nomata "nigra borso" kaj kontrabando vaste caras. Unu germana marko, laŭ la oficiala kurso egalas 10.256.-din. Pri tiu fakto mi aŭdis antaŭ kelkaj tagoj. Nigra borso, dume, ofertas -pere de siaj akaparuloj (t.n. "dileroj") - eĉ multe pli da dinaroj. Ĉion al ĉio, la ekonomia vivo nun travivas grandan kolapson.

Pro ĉio, ekzistanta serbia ŝtatregistaro fiaskis kaj prezidento de Respubliko Serbio proklamis balotojn por deputatoj de nova parlamento. Tiuj balotoj jam okazis la 19an de decembro 1993., kaj post tiu evento, el la tute, leĝe antaŭviditaj 250 mandatoj, laŭ partie gajnis: 1) SPS(123), 2) DEPOS(45), 3) SRS(39), 4) DS(29), 5) DSS(7), 6) DZVM(5) kaj KA(2), kvankam partoprenis plurdekojn da partioj. Kiel videblas civitanoj de Serbio donis siajn voĉojn kaj subtenon al la reganta, t.e. socialista partio. La popoloj vivantaj en Serbio donis avantaĝon al tiu politiko ĉar pritis ĝin ke tiu politiko tute respeguladas ties intereson. Do, ĉiuj civitanoj pli preferas la vivon en la paco ol en malpaco, kvankam ekonomiaj ambarasoj de la popoloj estas ~~estas~~ neimageble grandaj.

Dum la unua Sesio okazigonta en januaro 1994., post la baloto, parlamento elektos novproponitan ŝtatregistaron (ĉefministron kaj aliajn ministrojn). Intertempe la eksperto-teamo jam pretigis novan planon pri ekonomia reformo. La tasko de tiu plano estas, ke ĝi direktu estontan ekonomian vivon al la faligo de superinflacio kaj al-konduku ĝin al normalaj kadroj. Pri tiu plano nun oni diskutas kaj ĉiuj informrimedoj (ĵurnaloj, radio-elsendoj, Televido kaj aliaj) estas direktitaj al tiu celo. Kvankam unu parto de opoziciaj partioj ne havas la saman opinion, tamen ekzistas bezono la popolon ekkoni kun la enhavo de menciita plano. Krom organizaj procedoj en la ekonomio de la lando, oni ankaŭ antaŭvidas pligrandigo de produktado kaj iom post iom solvado de la problemoj de senlaboruloj.



Sofia Loren: edzino de l' sacerdoto...

ekkonis pastron Franco [Franko] mi estis 19jara. Estis tre bele paroli kun li, kiu tiam estis 27. Li komunikis sian toleremon, sian disponeblon. Li ne nur parolis sed ankaŭ aŭskultis kion la aliaj diris. Kaj tial mi sentis min sekura kun li. Mi ne enamiĝis tuj. Mi nur zorgis pri miaj studoj por atingi doktorecon en teologio. Li estis pastro kaj samtempe laboristo en iu fabriko. La definitiva elekto naskiĝis en ambaŭ ni. Kaj ambaŭ ni konsideris tiun elekton kiel maturan. Mi perdis la salutadon de kelkaj gekonatoj. Mi konfesis miajn problemojn al iu episkopo, kaj li tuj ordonis al mi pentofari. Mi respondis, ke mi havas nenion por penti, ne estas peko ami alian personon. Kiam en 1990 li estis forigita el siaj pastraj funkcioj, ni decidis geedziĝi. Mia patrino ne volis partopreni al la ceremonio.

Pastro povas esti bona edzo

Ankoraŭ hodiaŭ mia edzo laboras en komunumo por helpo al drogaĉ-uzantoj, kaj en tiu komunumo li diras meson. Ni havas du filojn. Jes, hodiaŭ pli ol hieraŭ mi estas plene konvinkita ke pastro povas esti bona edzo kaj bona patro."

Necesas diri, ke origine la sacerdotoj rajtis edziĝi. La eklezia leĝo malpermesanta tion estis enkondukita en 1139. Sed dum jarcentoj ne mankis oponantoj. Ĉu hodiaŭ ankaŭ tiu dogmo komencas ŝanceliĝi? Eble jes. En Italio, unu al la plej katolikaj landoj de la mondo, la edziĝintaj pastroj estas iom pli ol 10 000, kaj oni kalkulas ke multaj aliaj havas kaŝitajn rilatojn kun virinoj. En Italio naskiĝis asocio de edziĝintaj sacerdotoj, kies

nomo estas *Vocatio* [Vokáció]. Laŭ ties gvidanto: La eklezia institucio konas bone la situacion, scias ke pli kaj pli ofte sacerdotoj havas rilatojn kun virinoj; sed ĝi blinde rifuzas tion agnoski, kaj hipokrite kondutas kvazaŭ tiu afero ne ekzistus.

Paolo CERRETINI

SINDIKATOJ

Ĉu am-afero kun la malamiko?

Laŭ sindikatoj, merkatismo enkorpiĝas ĉion aĉan pri kapitalismo. Tamen, pro malaltiĝo de sindikato-membraro en Britio, la estroj de la sindikatoj pretas kuniĝi kun la merkatisistoj por apliki ties trukojn kaj varbi eksajn membrojn.

Statistikoj montras, ke perdiĝis inter 1979 kaj 1993 16 % da sindikatanoj. Kialas

- * timo pri sindikato-povo, kiu en la okuloj de multaj malbone efikis sur la ekonomion kaj la politikon dum la 70aj jaroj;

- * ŝanĝoj pri ĝeneralaj labor-kondiĉoj (pli da temp-onaj laborantoj, kiuj ne aniĝas al sindikatoj);

- * sento, ke sindikatoj eksmodiĝas kaj ne kapablas solvi problemojn ĉe la laborloko.

Evidentiĝas nun publico-kampanjoj por ŝveligi sindikato-membraron — kampanjoj indaj je la plej renomaj komercaj entreprenoj. Ĉu sukcesos la kampanjoj, tamen, restas alia afero.

Roselyne EDWARDS



lam vivis knabineto Nataŝa, kiu fidis al mirakloj kaj al fabeloj. Tamen tempo forpasis kaj mirakloj mankis. Nataŝa kreskis, kreskis, plenkreskis sed neniam perdis sian miraklo-fidon. Tiam ŝi komencis kolekti gnomojn, ĉar ili memorigis ŝin pri fabeloj.

Finfine ŝi kolektis dudek rondvizaĝajn barbuletojn, kiuj loĝas nun ne kiel forĝistoj aŭ trezor-gardantoj en ia mita subterejo sed kune kun Nataŝa en ordinara urba loĝejo en rusa urbo Murmansk. Nataŝa, 33-jaraĝa, kredas, ke la gnomaro alportas feliĉon. Nun la gnom-mastrino deziras sian kolekton pligrandigi... kaj pro tio komencis lerni Esperanton. Do, se esperantaj gnomoj aŭ ties gemastroj deziras kontaktiĝi kun Nataŝa, jen ŝia adreso: Natalija Temĉenko, ul. Deĵnjova 16, kv.4, RUS-183017 Murmansk, Rusio.

Jalina DVORECKAJA

Foto: Leo Fedosejev

Nova kurzo de dinaro egalas al unu germana marko, ĉar samtempe estas certigita ĝia subtenaĵo reala, t.e. ĝi havos sian internan valoron aŭ konverteblecon. Sed, por ke ĝi (reformo) povus plenumi siajn taskojn, estas antaŭviditaj samtempe multajn malfacilaĵojn. Pro tio, civitanoj estas invititaj por kulturi grandan disciplinon tiel ke ili povu kiel eble plej bone efektiviĝi sukcesojn.

Menciidas ke reformo realiĝos sub la kondiĉoj de la libera merkato, t.e. oni "glaciĝos" nek prezoj, nek luktoj de posteniĝitaj. La ŝlosilan rolon havos, kiel regulatoro, la fiska sistemo.

Kompreneble, la temo estas sufiĉe ampleksa, pro tio ne eblas ĉion diri, precipe pro la manko de paprspaco. Sed la vivo rapide fluas kaj supre dirita hodiaŭ - jam morgaŭ, preskaŭ ne estos aktuala. Tamen, la klopodoj estas ĉiam interesaj kaj atentindaj.

Januaro 1994.

+ SPS - socialista partio

DEPOS - koalicio de iuj demokratiaj partioj

SRS - radikala partio

DS - speco de demokratia partio

DSS - speco de demokratia partio

DZVM - partio de voĵvodiaj hungaroj

KA - partio de kosova albanoj

~~PARLAMENTAJ BALOTOJ KAJ ~~SENLABORECOJ~~ RESANIĜO~~

~~Nepavigebla blokado de tiu ĉi lando fare de UN ĉi pli kaj pli multe premas loĝantaron de Serbio kaj Montenegro. Jam sentas sia malsaton, diversejn malsanojn, senlaborecon kaj negativajn konsekvencojn. Pro ĉio infanojn, virinojn kaj maljunulojn multe suferas. Longaj vicoj de loĝantaĵo, antaŭ tre ofte preskaŭ malplenaj vendejoj, estas ĉiutagaj bildoj en ĉiuj urboj. La ekzistanta inflacio superis atingis rekordan nivelon kaj floras t'n' peris ĝis nun notitaj en la mondo. La germana mono, marko, estas dominante kaj plej serĉata valuto kaj per ĉiu estas ĉion trovebla kaj aĉetebla. Tiel nomata "nigra borso" kaj kontrabando vaste caras. Unu germana marko, laŭ la oficiala kurso egalas 10.256. din. Pri tiu fakto mi aŭdis antaŭ kelkaj tagoj Nigra borso, dume, ofertas pere de siaj akaparuloj (t.n. "dileroj") eĉ multe pli da dinaroj. Ĉion al ĉio, la ekonomia vivo nun travivas grandan kolapson.~~

~~Pro ĉio, ekzistanta serbia ŝtatregistaro fiaskis kaj prezidento de Respubliko Serbio proklamis balotojn por deputatoj de nova parlamento. Tiuj balotoj jam okazis la 19an de decembro 1993., kaj post tiu evento, el la tute, lege antaŭviditaj 250 mandatoj, laŭ partio gajnis: 1) SPS(123), 2) DEPOS(45), 3) SRS(39), 4) DS(29), 5) DSS(7), 6) DZVM(5) kaj KA(2), kvankam partoprenis plurdekojn da partioj. Kiel videblas Ĉivitanoj de Serbio donis siajn voĉojn kaj subtenon al la reganta, t.e. socialista partio. La popoloj vivantaj en Serbio donis avantaĝon al tiu politiko ĉar kritikas ĝin ke tiu politiko tute respeguladas ties interesojn. De, ĉiuj ĉivitanoj pli preferas la vivon en la paco ol en malpaco, kvankam ekonomiaj ambarasoj de la popoloj estas estas neimageble grandaj. Jam antaŭ la unua parlamenta Kunsido fakuloj~~

~~Dum la unua sesio okazigonta en januaro 1994., post la baloto, parlamento elektos novproponitan ŝtatregistaron (ĉefministron kaj liajn ministrojn). Intertempe la eksperto-teamo jam pretigis novan planon pri ekonomia reformo. La tasko de tiu plano estas, ke ĝi direktu estontan ekonomian vivon al la faligo de superinflacio kaj al konduku ĝin al normalaj kadroj. Pri tiu plano nun oni diskutas kaj ĉiuj informrimedoj (ĵurnaloj, radio-elsendoj, Televido kaj aliaj) estas direktitaj al tiu celo. Kvankam unu parto de opoziciaj partioj ne havas la saman opinion, tamen ekzistas bezono la popolon ekkoni kun la enhavo de menciita plano. Krom organizaĵ-procedoj en la ekonomio de la lando, oni ankaŭ antaŭvidas pligrandigo de produktado kaj iom post iom solvados la problemoj de senlaboruloj.~~

~~Solviĝos senlaborula problemoj.~~

~~Nova kurzo de dinaro egalas al unu germana marko, ĉar samtempe estas certigita ĝia subtenaĵo reala, t.e. ĝi havos sian internan valoron aŭ konverteblecon. Sed, por ke ĝi (reformo) povus plenumi siajn taskojn, estas antaŭviditaj samtempe multajn malfacilaĵojn. Pro tio, civitanoj estas invititaj por kulture grandan disciplinon tiel ke ili povu kiel eble plej bone efektiviĝi sukcesojn.~~

Menciindas, ke reformo realiĝos sub ~~la kondiĉoj de la libera merkato, t.e. oni "glaciigos" nek prezoj, nek luktoj, de poste-~~ ^{postulojn de dungitoj} ~~niĝitaj. La ŝlosiloj rolon havos, kiel regulatoro, la fiska sistemo~~

DANK' AL DIO!! Kompreneble, la temo estas sufiĉe ampleksa, pro tio ne eblas ĉion diri, precipe pro la manko de paprspaco. Sed la vivo rapide fluas kaj supre dirita hodiaŭ - jam morgaŭ, preskaŭ ne estos aktuala. Tamen, la klopodoj estas ĉiam interesaj kaj atentindaj.

Januaro 1994.

- + SPS - socialista partio
- DEPOS - koalicio de ~~iaj~~ demokratiaj partioj
- SRS - radikala partio
- DS - speco de demokratia partio
- DSS - speco de demokratia partio
- DZVM - partio de vojevodiaj hungaroj
- KA - partio de kosova albanoj

Balotoj kaj resanigxo

Nepravigebla blokado fare de Unuigxintaj Nacioj (UN) pli kaj pli premas la logxantaron de Serbio kaj Montenegro. Sentigxas malsato, malsano kaj senlaboreco, kiuj suferigas infanojn, virinojn, maljunulojn. Longaj vicoj staras cxiutage antaux ofte malplenaj vendejoj. Inflacio atingis rekordan nivelon kaj floras t.n. "nigra borso". Alfrontas al kolapso la ekonomia vivo.

Pro tio la sxtata registaro en Serbio okazigis en decembro balotojn parlamentajn. Laux partie gajnis SPS (Socialista partio) 123 mandatojn, DEPOS (Koalicia, demokratia partio) 45, SRS (Radikala partio) 39, DS kaj DSS (ambaux speco de demokratiaj partioj) resp. 29 kaj 7, DZVM (partio de vojvodiaj hungaroj) 5 kaj KA (partio de kosovaj albanoj) 2. Pli grandan subtenon rikoltis la reganta, socialista partio.

Jam antaux la unua, postbalota parlamenta kunsido pretigis fakuloj planon pri ekonomia reformo por faligi inflaciegon. Oni antauxvidis ankaux pligrandigon de produktado por ke iom post iom solvigxu senlaboreco-problemo. Menciindas, ke reformo realigxos sub libera merkato, t.e. oni glaciigos nek prezojn nek postulojn de dungitoj. Sxlosila rolo ludu fiska sistemo.

Kontraŭ faŝismo

En Prago estis mortigita 19jara knabo, kiam li noktomeze revenis el junulara diskoteko. Li fariĝis viktimo de grupo de faŝismemaj junuloj. La patro de la mortigito, filmreĝisoro Vlastimil Venclík [Vlastimil Venclik] decidigis prepari filmon pri la morto de sia filo.

Kun aliaj personoj li fondis societon „Movado de civitana solidareco kaj toleremo”, kies tasko estas kontraŭi ĉiuspecajn provojn de propagando de faŝismo, rasismo kaj kontraŭjudismo kaj atingi tion, ke perfortaj agoj, fontantaj el netoleremo, estu punataj. Krome la societo intencas disponigi juran protekton al viktimoj de diskriminaciaj atakoj kaj informi la publikon pri la rezultoj de siaj aktivecoj.

Al la movado jam aliĝis konataj ĉeĥaj politikistoj kaj aktoroj kaj la polic-prezidanto en Prago promesis helpon.

Jiří PATERA

SERBIO

Balotoj kaj resaniĝo

Nepravigebla blokado fare de Unuiĝintaj Nacioj (UN) pli kaj pli premas la loĝantaron de Serbio kaj Montenegro. Sentiĝas malsato, malsano kaj senlaboreco, kiuj suferigas infanojn, virinojn, maljunulojn. Longaj vicoj staras ĉiutage antaŭ ofte malplenaj vendejoj. Inflacio atingis rekordan nivelon kaj floras t.n. „nigra borso”. La ekonomia vivo alfrontas kolapson.

Pro tio la ŝtata registaro en Serbio okazigis en decembro balotojn parlamentajn. Laŭpartie gajnis SPS (socialista partio) 123 mandatojn, DEPOS (koalicia, demokratia partio) 45, SRS (radikala partio) 39, DS kaj DSS (ambaŭ speco de demokratiaj partioj) resp. 29 kaj 7, DZVM (partio de vojvodinaj hungaroj) 5 kaj KA (partio de kosovaj albanoj) 2. Pli grandan subtenon rikoltis la reganta, socialista partio.

Jam antaŭ la unua, postbalota parlamenta kunsido fakuloj pretigis planon pri ekonomia reformo por faligi inflaciegon. Oni antaŭvidis ankaŭ pli grandigon de produktado por ke iom post iom solviĝu senlaboreco-problemo. Menciindas, ke reformo realiĝos sub libera merkato, t.e. oni glaciigos nek prezojn nek postulojn de dungitoj. Ŝlosilan rolon ludu fiska sistemo.

Obstakloj survoje al paco

La israela registaro lanĉis en septembro pasintjara sensacian novaĵ-bombon: pac-projekton cele al paca kunvivado inter popoloj interbatalantaj pli ol 100 jarojn. Vidiĝis manpremo inter la ĉefministro de Israelo, Jichak Rabin, kaj la ĉefo de PLO, Jaser Arafat, en ĉeesto de la usona prezidanto kaj de la rusa ministro pri eksteraj aferoj. Dumtempe pasis pluraj monatoj. La etoso de eŭforio kaj optimismo pri baldaŭ okazonta interpaciĝo montriĝis frua, eble naŭva espero. La mode-re kaj pragmatisme pensantaj homoj emas al kunlaboro en diversaj kampoj, kiel decas al kulturitaj, suverenaj nacioj. Aliflanke ekstremismaj elementoj opinias, ke la nuna stato estas preferinda ol iu ajn radikala ŝanĝo. Laŭ ili Israelo ne havas ekzistorajton, ĉar „juda popolo ne ekzistas”, kaj la palestina ŝtato devas etendiĝi de Mediteraneo ĝis Jordano.

Ankaŭ inter israelanoj ne mankas ekstremistoj, dekstremuloj kaj judaj loĝantoj en la „teritorioj”, timante, ke ili devos forlasi siajn hejmojn, kiam la aŭtonomio, kaj fondiĝo de palestina ŝtato, validiĝos. Teror-agojn fare de araboj sekvas kutime ŝtormaj kontraŭ-registaraj manifestacioj, kaj venĝatakoj kontraŭ plej ofte senkul-paj araboj. Sed la registaro senhezite strebas al paca solvo, kaj espereble tiu prosperos por la bono de ĉiuj koncernataj flankoj.

Teodoro LÖWENKOPF



Arafat kaj Rabin: manpremo



Palestinano inter brulantaj aŭtoj. Kiom longe plu?

TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO (TEĴA)

T r e j n a d o d e Ĵ u r n a l i s t o j

Leciono 7: Taskoj!

Por respondi la demandojn, imagu, ke vi redaktas E-revuon, kiu sin koncernas i.a. pri politikaj aferoj (ekz. *Eŭropa Esperantisto*, *La Verda Proleto*, *Monato*)

1. Legu la artikolon *Komentarioj al la eŭropaj elektoj*. Kion fari? Kiel vi, kiel redaktoro, reagas? Respondu plene laŭdezire, plene libere al tiu ĉi demando!

(7 poentoj)

2. Vi ricevas gazetaran komunikon de Radio Split. Vi scias, ke la elsendo jam disaŭdiĝis, kaj ke aliaj revuoj la samon komunikon havas. Reverku la komunikon gazetocela, kun titolo, kaj indiku, kiom da vortoj vi uzis.

(8 poentoj)

3. Iu sendas al vi artikolon *Portreto de senlabora moskvanino*. La artikolo interesas vin, tamen vi havas spacon en la revuo por nur 250 vortoj. Reverku ĝin laŭe!

(10 poentoj)

(Entute 25 poentoj)

Komentarioj al la eŭropaj elektoj.

Ĉiun fojon ni en Danlando havis elekton al la Europa Parlamento, la duonon de la danoj voĉdonis kontraŭ ĝin. La lastan fojon la kontraŭuloj estis iom malpli ol la jes voĉoj. Tio okazis kvankam la plej granda parto de la politikistoj faris grandegan propagandon por , ke ni eniru la eŭropan kunlaboron. Persone mi ĉiun fojon voĉdonis kontraŭ. Kial vi verŝajne volas demandi. Ni en Danlando deziras mem decidi nian politikon, ni ekzemple ne deziras, ke la kemiindustrio rajtos ĉi tie vendi venenajn spruĉilojn, kiujn ni jam malpermesis. Ni^{ne}deziras, ke bureaukratoj en Bruselo devas decidi por ni. La 25% de la personoj, kiujn ni elektis al la parlamento estis kontraŭ- aŭ skeptikuloj. Ni esperas ke tiuj sekvas la evoluon kaj postulas demokratan malfermon. Kompreneble la landoj devas kunlabori en la moderna vivo, sed kiel memstaraj individuoj por solvi la problemojn de malriĉeco kaj senlaboro en riĉa teknika mondo, kie ni bezonas tute novan pensmanieron.

**SLOBODNA
DALMACIJA**

RUKOPIS

" M O N A T O "

SLOG

0- Interparolo kun motivo

ANNE DAWSON-SHEPHERD, estrino de splita Ofico de alta komisione por rifugintoj de UN

NENIU PLI BONE OL KROATIO ENDOMIGIS RIFUGINTOJ !

5- Koncerne la Kroation, diras s-rino Shepherd, ne eksistas landon en la mondon kiu en la plej bona maniero endomigis rifugintoj kiuj ĉi tie troviĝas en komfortaj hoteloj apud la bordo. Problemoj inter domnastroj kaj rifugintoj de tempo al tempo multiplikas.

10- - Nia kunparolistino estas Anne Dawson-Shepherd, estrino de Ofico de Alta komisiono de UN por rifugintoj en Split, kaj motivo de la parolado estas reveno Anne Dawson-Shepherd en Brition, do rekapitulacio de ĉion kion ĉi vitala angla damo kun dekdu jara sperteco kiel oficistino de UNHCR-o atingis je laboro inter rifugintoj el BkH en Kroatio. Pro tio ni komencis la paroladon per peto ke s-rino Dawson-Shepherd, donu rezonon de tio kion ĝis nun estis farinte en la Ofico de UNHCR-o en Split.

15- - Kiel konate ke UNHCR-o okupiĝas pri problemoj de rifugintoj kaj ekzilitoj el eksa Jugoslavio, sed gravas klarigi ke la Ofico en Split de ĉi internacia organizaĵo taskigita por rifugintoj el BkH lokigitaj sur tereno de Dalmata regiono, kaj de kiam Kroation plaŭdis grandan rifugintojn ondojn. Alie la Ofico de UNHCR-o je teritorio de suda kroatio egzistas ankoraŭ en Dubrovnik, kaj niaj aktivuloj estas aktivaj ankaŭ en Makarska. La Oficejo en Split, dum pasinta tempo, dum mi estas ĝia estrino plenplene efektivigis sian taskon kunlaborante bonege kun Ofio por rifugintoj ekzilitoj kaj rifugintoj pri Kroata Registaro kaj kompetenta ministraro. Multon ni laboris je ŝirmo de homaj rajtoj de rifugintoj, organizante seminariojn per rifugintoj, temoj por policaj aktivuloj kaj por ĉiuj kiuj estas en konstantaj kontaktoj kun rifugintoj.

30- Ni helpis ankaŭ domnastroj de rifugintoj per destinita helpo.

2.-

- La vorton estas pri financaj rimedoj, kioma estis tia helpo?
- Mi povas al vi diri ke nur en la 1993. jaro nur por enloĝantoj apartigis 27 mil. dolaroj. Nia entuta duĝeto por tiu jaro estis proksime 60 mil. dolaroj, do 90 miloj, kiom estis planite por la kuranta 94 jaro. Tamen, dum daŭro de la jaro ni povas de la internacio komunumo "peti" tiun monon.
- Kiuj estas la plej grandaj donatoroj de UNHCR-o kaj kia estas Via kunlaboro kun aliaj humanitaj kooperativoj, kiuj agas en Kroatio?
- Grandaj donatoroj estas Grand Britio, EK, USONO kaj Japanio. kaj kunlaboro kun humanitaj organizoj estas je altnivelo. UNHCR havas sub sia kontrakto 10 int. hum. org. sed ĉiam ni estas pretaj kunlabori kun tiuj kiuj deziras helpi.
- Se mi ne trompas, UNHCR helpas laboron de Bosnia-Hercegovinaj lernejoj lokitaj sur teritorio de Kroatio Suda.
- Jes. Ni detale studis nian programon por helpo de lernantoj el BkH. Ni aĉetas bezonataj libroj kaj aliaj necesaj helpiloj ni honorigas la instruistoj kaj ni zorgas pri veturado de lernantoj ĝis la lernejo. Ni helpas eĉ 27 lernejoj sur Dalmatio kaj ne forgesanta ankaŭ tiuj rifuĝintoj kiuj vizitas lernejoj en kroataj lernejoj.
- Kio estas kun helpo por ekzilitoj, kaj je kiuj maniero Vi helpas ilin?

Alvoko por rikolto

Al ekzilitoj ni helpas je pliaj manieroj. Ni partoprenis je rekonstruado de difektitaj loĝobjektoj, kaj disdonis ilaron kaj semon por rikolto al malpli nombraj ekzilitoj, kiuj sukcesis reveni je siaj fajruoj. La ĉi programoj ni daŭrigos en 1994. sed tamen ni pensas ke ekzilitoj bezonas reveni je iliaj hejmoj nur tiam kiam por tio estos plenigotaj ĉiuj kondiĉoj.

3.-

- Kion de humanitara helpo kiun UNHCR-o alportis sur teritorio de BkH alvenis ĝis la fina loko kaj kio estas per helpo de kroatoj en meza Bosnio?

- Mi ne estas kompetenta por paroli pri alportanta helpo en BkH sed mi al vi povas diri ke nur 10 procentoj de sendita helpo venas je fina lokoj, kaŭze de tio estas ĉu la milito, ĉu pro blokado de unu el tri menciitaj fortoj. Kion mi scias, la helpo alportanta estas ankaŭ en kroataj teritorioj, kaj ĉion tion hodiaŭ estas pli malfacile pro milito en meza Bosnio.

Grandega ŝarĝo por Kroatio

- Pere de UNHCR-o parto de rifuĝintoj lokigitaj en Kroatio, vojaĝis eksterlanden, diru al ni, en kiuj klasoj apartenas rifuĝintoj kiuj la vivon daŭrigos rigos en la triaj landoj.

- UNHCR-o jam loge laboris por ke oni de Kroation forprenu grandegan ŝarĝon de rifuĝintojn. Kiel al ni anoncis Registaro de Usono, Danlando kaj Norvegio kun deziro ke sub severaj difinitaj kondiĉoj ricevu grupoj de rifuĝintoj el BkH, ni insiste kaj profesie faris tiun laboron. Foriris la unuaj kampadeanoj, virinoj, viktimoj de teroro kaj homoj kiuj havas sian familion en tiuj landoj. Kiel poste en ni telefone anoncis iuj de ili, ni ekscias ke ili tien bonega sin orijentigis. Parton de rifuĝintoj kiuj foriris helpe de aliaj humanitaraj organizaĵoj ne estis entute kontentaj. Ekz. homoj forvojaĝantaj al Pakistano bonege estis atendantaj de ties Registaro, kaj ne povus bonege adapti al vivo en novaj viv-kondiĉoj.

- Vi laboris kun rifuĝintoj el Nikaragvo, Salvadoro kaj Gvatemalo. En Hong Kong vi zorgis pri rifuĝintoj el Vietmanio... Komparu siaj ĝisnunaj spertoj kun tiuj kiuj vi portas el Kroatio.

- Ĉi tio estas la unua fojo ke mi laboris kun rifuĝintoj laŭ europa shemo organizado, kaj tio estas preskaŭ neeble kompari kun

4.-

mia antaŭa laboro. Tamen, ĉion estas unike por ĉiuj krizaj teritorioj, ke al tempo la problemoj multobligas inter dommastroj kaj rifuĝintoj, ĉar ĉiuj dommastroj senkulpigo esperas ke rifuĝintoj kalvario dauros pli malmulte.

Rilate la Kroation, ne ekzistas lando sur la mondon kiu je pli bona maniero endomigis rifuĝintoj. kiuj ĉi tie troviĝas en komfortaj hoteloj apud la bordo. Krom tio, en la mondon oni kutime rigardas kun dozo da tromaturigo kion ĉi tie ne estas okazo, ĉar per ilia alveno en Kroatio anonciĝis imponanta nombro da homoj per deziro ke ilin enlokigiĝos.

- Finfine, diru al ni, se ne estas sekreto, kiu estos via anstataŭanto je frunto de la Ofico en Split, kaj kian pozicion vi restigas.

- Al anstataŭanto Walter Irving mi restigas pli malbonam pozicion, se ni diras ke humanitara helpo ne povus esti ŝanĝo por politika solvo, kion nun ankoraŭ ne antaŭvidas, kaj se estas vorto pri tio kion Kroatio faris kur rifuĝintoj, tiam s-ro Irving povus esti sufiĉe kontenta.

DAVOR GRGAT

Portreto de senlabora moskvanino

Ege malrapide, kun grandaj penoj kaj je prezo de forrabo de preskaŭ tuta loĝantaro Ruslando enrampas en merkatekonomion. Ekonomia krizo, politika kaj organiza ĥaoso, strikoj kaj "parado de suverenecoj"- al ĉio ĉi nun aldoniĝas nova plago: senlaboreco. Oni fermas neefektivajn kaj foje eĉ tute senutilajⁿ kaj superflujajn entreprenojn kaj organizaĵojn, oni forpelas superfluan personaron, industrio komencas trairi strukturan 'perestrojkon' - ĉio ĉi donas sian kontribuon. Tamen en ĉefurbo Moskvo la situacio estas ege pli akra. Oni fermis pli ol 100 ministeriojn, multe da t.n. 'esploinstitutojn'; precipe, de tiel nomata milita profilo, kaj subite miloj de tre kvalifikitaj personoj okazis sur trotuaroj. Interese, ke 8.80% de la senlaboraro estis^a virinoj. (Pri realaj ciferoj de senlaboruloj oni disputas, tamen ili ĉiam kreskas kaj oni diras, ke fine de 1992 ĝi povas atingi duonmilionan nivelon). Magistraro kaj Virina Unio de Rusio (posteulo de eksa Komitato de soveta virinoj) aranĝis kvin foirojn de vakantaj laborlokoj, kiujn vizitis (fine de marto) ĉ. 7 mil da virinoj kaj pr. ĉiu kvara vizitantis^{sukcesis} ricevi sendokumenton al laboro aŭ lernejo. Tamen la problemo ĉiam pliakriĝas. Dum ĉiu foiro fakuloj faris tradiciajn enketadojn de kiuj oni povas nun desegni 'portreton' de senlabora moskvanino. Statistike, ŝi estas virino mezaĝa (36-45 jaroj; aĝo de emeritiĝo en SU/Ruslando estas 55 jaroj; interese, ke en kelkaj raportoj oni indikas, ke nur en Moskvo KGB havis^{'floton'} el kelkmil da junaj virinoj de aĝo de 16 ĝis 36 jaroj kaj ĉiutage/ĉiunokte kvazaŭ ricevas po 1 miliono da dolaroj de profito el la fonto, kontroli la fakton mi ne povas); havas altan klerigon (76%), kiel regulo, inĝenier-^{de}teknika profilo (paradokse, 8.80% da ^{ka}vantaj lokoj estas lokoj por simplaj laboristoj).

Kialoj de laborperdo? Preskaŭ ĉiuj (98%) respondis, ke oni perdis laboron pro eksigoj, pro redukto de personaro en ŝtataj entreprenoj, kie oni ne povis proponi al ili konvenan laboron. Preskaŭ ĉiuj provis trovi laboron ~~pere~~ ^{regionaj} de rajonaj laborkontoroj. Triono da ili ricevis malakcepton pro manko de sufiĉan sperton por la respektiva laboro (memoru pri diferenco inter nivelo de klerigo kaj bezono de industrio; privata sektoro estas en rudimenta stato, tre malevoluita estas servistsektoro/sektoro de priservoj); por dek procentoj de kandidatoj oni rifuzis pro jam okupita loko (ankaŭ laboro de l'kontoroj ne estas modela); 11% el ili mem rifuzis pro tro malalta salajro. Kion oni preferas dum serĉo de laboro? Jen estas proksimuma listo de preferindaj profesioj: sekretariino, tajpistino, referento, afergvidantino, programisto/ operatoro de komputilo, librotenistino, ekonomisto, edukistino/guvernantino, privata instruistino. Ĉar plimulto da ili havas inĝenierteknikan klerigon, oni provis ekscii, ĉu estas inter ili tiuj, kiuj pretas malaltigi siajn postulojn al nova laboro. Tiaj okazis 22%. Triono el ili volus reteni sian nunan profesian statuson.

Tamen la plej neatendita por fakuloj kaj pro tio treege grava okazis konkludo: aktive kaj tre rapide malboniĝas psikologia stato de virinoj, kiuj perdis laboron. La virinoj mem opinias, ke la stato de embarasiĝo signife malpliboniĝas pro indiferenta rilato flanke de l'socio al senlaboruloj, aparte, malkorekta rilato al ili flanke de laboristoj ^{de} regionaj laborkontoroj, kaj ankaŭ en laborlokoj, kien oni sendis ilin. Ĉion ĉi konfirmas ankoraŭ unu fakto: preskaŭ ĉiuj el ili eĉ nenian imagon havas pri siaj rajtoj kiel senlaborulo. La kurantaj informoj indikas, ke la procezo de pliakrigo de senlaborecproblemo inter virinaro daŭras kaj ke perspektivoj ne estas bonaj.

Tamen la procezo^{tute} ne estas neofenda, ĝi ja havas kaj havos seriozajn postsekvojn por tuta socio. Ja rezulte ne nur malaltiĝos enspezoj de multaj familioj, ne nur ^{okazos} elpremo for de labormerkato^{de} fakulojn, por preparo de kiuj ŝtato, socio elspezis grandajn rimedojn, sed ankaŭ tio estos la plej esprimplena ekzemplo de diskriminacio laŭ seksaj kaŭzoj. Intertempe ruslanda parlamento ŝajnigas, ke la problemo tute ne ekzistas, kaj la registaro preferas trakti nur problemon de helpo/defendo de patrineco kaj infanececo, kio ne tute kovras la problemaron. La struktura politiko rilate al la plej serioza problemo submetas ankoraŭ unu danĝeran minon sub la jam mult^tsuferanta socio.

TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO

T r e j n a d o d e Ĵ u r n a l i s t o j

Leciono 8: Eseoj kaj komentarioj

Ĝis nun estas nenio dirita pri etikaj kaj juraj konsideroj -- vasta kampo, pri kiu devas konscii ĉiu verkonto. Ĵurnalisto, ĉu esperantista aŭ ne, devas akcepti respondon pri tio, kion ŝ/li verkas. La respondo estas enorma: Homoj, pri kiuj oni verkas, devas esti protektataj de la atakoj, de la moko de entuziasmaj, superfervoraj sed finfine arogantaj verkantoj.

Eĉ nacinivele etikaj kaj juraj konsideroj komplikas: Ofte ŝanĝiĝas la leĝoj koncerne la gazetaron, kaj oni devas ĉiam atenti ne nur kion oni rajtas diri, sen ankaŭ kiel kaj kiam oni rajtas ĝin diri. La praktiko diferencas de lando al lando: Ekzemple, dum jur-proceso, povas esti, ke en iuj landoj oni ne rajtas riveli la akuzito-nomon; en aliaj nur initialon de la familia nomo; en aliaj la tutan nomon.

Mankas spaco en tia ĉefe praktika kurso por profundigi en etikaj, juraj aferoj; tamen konsilindas studi MpĴ [p.77-80]. Baza maksimumo devas esti jena: Se pri etika aŭ jura punkto vi dubas, aŭ konsiliĝu de fakulo aŭ -- ofte pli saĝe -- simple pri ĝi rezignu. Etiko kaj juro tuŝas ne nur raportojn, sed ankaŭ ĉion alian, kion vi verkas -- ekz. eseojn kaj komentariojn. Eseoj kaj komentarioj certagrade similas unu la alian; tamen ne laŭ *Plena Ilustrita Vortaro*. Laŭ PIV, komentario estas 1. rimarkigoj aŭ notoj, klarigante tekston aŭ verkon; 2. klarigoj pri ies intencoj, opinioj; 3. libro pri historiaj eventoj. Eseo, aliflanke, estas mallonga literatura verko, en kiu la aŭtoro ne intencas funde pritrakti sian temon.

Sendube la dua PIV-difino pli proksimiĝas al la gazetara senco de komentario, kvankam la nocio de eseo kiel literatura verko nur leĝere pritraktanta la temon sonas bizara. Certe, oni atendas en eseo poluritajn frazojn, elegantajn parolturnojn . . . sed kun enhavo bagatela, ŝaŭma? Mi dubas . . . kaj neniel en universitata kunteksto! Kontrolu la difinojn en MpĴ [p.22-23].

Ĝenerale, en la plej prestiĝaj naciaj gazetoj, la rajton eseumi

kaj komentarioj akiris nur la plej spertaj verkistoj, kiuj pro la saĝeco akirita dum longa kaj sukcesa kariero povas problemojn diversflanke reliefigi: la opiniojn de tiuj eminentuloj oni respektas (eĉ se oni ne konsentas).

La devo de komentiisto, do, kontraste kun tiu de raportisto (kiu koncize, objekte informas) estas pli amplekse, ofte subjektive (tamen juste) klarigi, prikomenti, analizi eventojn, por helpi al leganto difini la propran vidpunkton pri afero okazinta, -anta aŭ -onta.

Komentarioj trovas lokon ofte en semajnfinaj gazetoj, kies redaktoroj tempon disponas por sublupeigi la aferojn de la pasinta semajno. Male la kolegoj ĉe labortagaj gazetoj: Mankas tempo, spaco por prilumi, esplori temojn. Gravas faktoj, kernas aktualeco: superfluas opinioj.

La esperanta gazetaro troviĝas en meza, iasence nenieslanda pozicio; t.e. inter la simpla raporto-bezono de la labortagaj gazetoj kaj la komentario-deziro de la semajnfinaj. La tialo evidentas: Mankas en Esperantujo ĉiutagaj gazetoj. Aperas en la esperanta mondo revuoj kaj bultenoj kaj magazinoj semajne, monate, aŭ dumonate.

Tio signifas, ke la enhavo -- kiel malfreŝa fiŝo -- jam putras, antaŭ ol atingi la leganton; kaj povas esti, ke tiu jam legis pli malpli saman artikolon en informilo hazarde presita pli proksima al la evento mem. Alivorte: Por vigligi la enhavon de esperanta artikolo, necesas ofte komentario-dozo, kiu kontribuos ion apartan, ion karakterizan al la raporto. Kaj: Ju pli malofta la eldon-ritmo de la revuo, des pli granda la dozo.

Tio ne signifas, ke permesate estas elfenestrigi la antaŭajn lecionojn pri koncizeco. Mi jam aŭdas la riproĉojn: "Ho! Jen la ulo, dirante, ke komentarioj estas pli ampleksaj ol nuraj raportoj, ke plej verŝajne ĉiu esperanta artikolo enhavas komentario-traĵtojn -- do bone: Mi vort-lavangumos kiel kutime . . . " Male. Mi ripetas: Longeco estas la malamiko de bona gazetara verkado. Ke Esperanto-artikolo ampleksas kaj faktojn kaj komenton, kunportas eĉ pli da fajlado antaŭ ol vi rajtas kontentiĝi pri la rezulto.

Tamen gardu vin kontraŭ raportoj, kiuj vole nevole fariĝas

komentarioj. Nespertaj verkantoj senpripense ofte simple komentarias (je certa nivelo pli facilas komentarii, ol raportoj, ĉar ĉiu havas propran opiniojn, kaj serĉas platformon por aŭdigi la opiniojn; faktoj, kvankam sanktaj, tro ĝenas buŝemulojn). Tiam ekzistas danĝero, ke ensoviĝas mi-ismo . . . kaj sinsekvo de ne pravigeblaj opinioj, sen faktoj, sen informo, simple agacas la leganton.

Maksimo: Se vi raportas, raportu. Objektiveco estu la deirpunkto. Memoru la enkondukan ko-don (leciono 1), prezentu faktojn . . . kaj poste, jes, en esperanta artikolo, se necese, komentarietu. Sed rezignu pri mi-ismo: En raporto ĝi ne troviĝu lokon. Anstataŭ diri: Mi opinias, ke la kongreso estis temporaba kaj vanta; aŭ: Mi taksas la aferon idiota, skribu: Aŭdiĝis kritikoj pri eventuale temporaba kaj vanta kongreso; aŭ: Oni taksas la aferon idiota.

Tiel vi ja komentarios, sed kaŝe, neŭtrale . . . ĉar en raporto la unua devo estas raportoj, informoj.

Ekzistas kompreneble veraĵoj komentario-rubrikoj. Ne temas pri la esperanta miks-fenomeno de raporto plus iom da komentario; temas nure-pure pri komentario. Tie vi rajtas disponi pri pli da vortoj, pli da spaco, por prilumi vian temon. Ofte superfluos tro da faktoj: Depende de la temo, vi rajtas diri al vi, ke la kernaj faktoj jam estas konataj. Alivorte: Vi ne informas pri tio, kio estas nekonata; vi analizas tion, kio jam estas konata.

Evidente, bona komentariisto, kvankam ŝ/li verkas de subjektiva vidpunkto, prezentos kiom eble plej multajn facetojn de la temo: Tie la diferenco inter multflanka komentario kaj unuflanka polemiko. Denove: Relegu la difinon de komentario en MpĴ.

Kaj fina punkto: Kvankam verki komentario estas subjektiva afero, kelkaj praktikantoj preferos anstataŭ kruda mi: Ni. Ili argumentas, ke mi-ismo kreas barieron inter verkinto kaj leganto: Ni-ismo, tamen, ligo.

Kaj nun: Turnu vin al la ekzercoj!

ppg

TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO

T r e j n a d o d e Ĵ u r n a l i s t o j

Leciono 8: Taskoj!

1. Reserĉu la jurajn kondiĉojn en via lando, sub kiuj gazetistoj laboras. Enketu ĉe biblioteko aŭ prefere telefonu la redaktoron de via loka, nacilingva gazeto kaj aranĝu intervjuon, dum kiu vi povos ŝ/lin pridemandi. Tiam verku 400-vortan eseon pri la rezultoj de viaj reserĉoj!
(5 poentoj)
2. Analizu la raporton *Kasacia kortumo kontraŭ la kataluna* (el MONATO, junio 1994). Ĉu en ĝi troviĝas komentarioj trajtoj? Verku 100-vortan respondon!
(5 poentoj)
3. Analizu la artikolojn *Papera tigro* kaj *Filino mortigita: Kiu kulpas?* (ambaŭ el MONATO, junio 1994). Kial ili troviĝas sub rubrikoj *El mia vidpunkto* kaj *Opinio*? Verku 250-vortan respondon!
(5 poentoj)
4. Elektu unu el la sekvantaj temoj kaj verku pri ĝi 600-vortan komentarion:
Medio-protektado
Besto-raĵtoj
Koloniismo aktuala
La kosto de traduk- kaj interpretado
Spac-esplorado
Monda malsato
(10 poentoj)
(Entute 25 poentoj)
ppg

esp\teja\lec.8